
ESPERANTO



La 12-a Internacia Junular-Kunveno en Büsum (vd. p. 92)

N-ro 607 (6)



Junio 1956

REVUO INTERNACIA

Revuo Internacia

N-ro 607 (6)

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio

(En Konsultaj Arangoj kun U.N.E.S.C.O.)

Fondinto: H. HODLER

* * *

Honora Redaktoro: HANS JAKOB

* * *

Ĉion por la redakcio oni sendu al la
Redaktoro: W. AULDKnockfarril, Thornside Road, Johnstone, Renfrew-
shire, Skotlando.

* * *

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo
ESPERANTO (abonado, reklamoj, anoncetoj)
sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASO-
CIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam C, Nederlando.
Telefono: Rotterdam 128313. Ĝirkonto: 378964.

* * *

Bankisto de U.E.A.:

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam C.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj,
kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian
represaĵon al nia redakcio.Jara abono (1956): 7.50 n.gld. (kun membreco kaj
jarlibro 10 n.gld.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

* * *

Tarifo por reklamoj:

1 paĝo	128.— gld	1/2 paĝo	64.— gld
1/4 paĝo	32.— gld	1/8 paĝo	16.— gld
	1/16 paĝo	8.— gld	

Anoncetoj pri korespondado:

0,10 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por
ĉiu duoj da vortoj.

Legantoj en 80 landoj

Estraro de U.E.A.:

E. Malmgren, prezidanto, Heleneborgsgatan 6,
Stockholm, Svedujo.Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77
Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Bri-
tujo.D. Kennedy, vic-prezidanto, 21 Westfield Road,
Bishop Auckland Co. Durham, Britujo.P. M. Mabesoone, estrarano pri financoj, Pytha-
gorasstraat 122, Amsterdam-O, Nederlando.R. Llech-Walter, estrarano pri kongresoj, 5 Quai
Vauban, Perpignan (Pyrénées-Orientales),
Francujo.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex,
Britujo. Telefono: ARNold 90-81.

E N H A V O

Esperanto en la sveda parlamento. <i>Dahl</i> ...	89
La grukoj de Kumbel. <i>Thorsen</i>	90
Frostavallen 1956	91
12a Internacia Junular-Kunveno	92
Oni povas helpi	93
La granda koncerto. <i>Palma Grand</i>	94
Revojaĝo hejmen. <i>M. Sikkema (H. Ver- muyten)</i>	97
Se mi sciintus, ke vi venos. <i>F. I. Wiener</i> ...	98
el „La pilgrimo de Childe Harold”. <i>Byron</i> (<i>J. Francis</i>)	99
Krucvortenigmo	100

Rubrikoj

CED	91
Radio-Babiloj	93
41a U.K.	93
Esperantista Vivo & Nekrologo	100
La Internaciaj Konkursoj	100
Novaj libroj	101
Nia Forumo	102
Oficiala Informilo	103
Radio	104

ESPERANTO EN LA SVEDA PARLAMENTO

En la sveda parlamento la 7-an de marto okazis tuttaga diskutado pri la eksterlanda politiko. En la longa vico de parolantoj nia samideano kaj UEA-komitatano Einar Dahl, Uddevalla, estis. El lia parolado ni represas la ĉi suban, kio certe interesos la esperantistaron.

Fakto estas, ke la intereso pri la eksterlandaj politikaj problemoj ne estas granda ĉe la sveda popolo. Mi havas la koncepton, ke estas eksterordinare grave por la internacia evoluo, ke ĝi estas apogata de konscia volo kaj vaste bazita kompreno de la larĝaj popoltavoloj.

Svedujo marŝas laŭ la vojo de la absoluta neŭtraleco. Sed neŭtraleco ne estas aperi nenie sed agi ĉie.

Laŭ mia opinio malgranda lando kiel Svedujo devas rilate al la eksterlanda politiko esti aktiva. Kompreneble ni ne miksiĝu en la imperialistajn batalojn, aliĝante al blokoj aŭ paktoj, sed troviĝas aliaj rimedoj, kiuj ebligas rezultodonajn farojn.

La malgrandaj ŝtatoj devas ne nur timeme rigardi la agojn de la potenculoj kaj voĉdoni tiel, kiel la reala prijuĝo dekretas por la propra bonfarto kaj sekureco. Ili devas esti la neniam silenta konscienco de UNO, la ĉiama atentiganto pri la bazaj celoj de la mondorganizo, jes eĉ — se tio estos necesa — la krianta voĉo en la dezerto de la egoismo kaj perforto.

Sed ne sufiĉas la kutimaj, konvenaj, diplomataj iloj aŭ irado sur la tradiciaj vojetoj. En la intereso de la homaro kaj mondpaco oni ne devas heziti iri ekster la ĉiutagaj perceptoj kaj antaŭjuĝoj, ĉar la teruraj perspektivoj rilate al la estonteco, kiujn la teknika evoluo desegnas, klare evidencigas, ke neniam oferoj estas tro grandaj, neniam streĉoj estas tro multekostaj kaj neniam faroj tro sensignifaj, kiam oni volas en la homoj krei senton de kuneco aŭ internacia kompreno pri la homaj rajtoj kaj devoj.

Eĉ se estas tiel, ke la evoluo, depost la fondiĝo de UNO en la mizeroj de la dua mondmilito, estis alia ol oni intencis, deziris, kredis kaj esperis, tamen restas la ideala kaj homa fundamento de UNO, kaj la celo de la organizo brilas — malgraŭ ĉio — kiel stelo de espero super la sortovojo de la homaro.

Ĝuste koncerne tiun fundamentan punkton la malgrandaj membroŝtatoj de UNO devas agi, kaj mi opinias, ke la sveda eksterlanda politiko devas montri pli da viveco, pli da antaŭenemo, pli da proponemo kaj pli da aŭdaco.

Ĉia historia sperto donas al ni la averton, ke politiko, kiu konstruas sur miskredo, supozemo, pli grandaj armigoj, aliancoj kaj paktoj, pli frue aŭ pli malfrue finiĝas en la tragedio de la milito. Tiu fakto ne estas forŝovebla.

Ni do devas krei pli ampleksajn konfidon kaj kunlaboremon, klopodi rompi la murojn, kiuj di-

sigas la homojn, klerigi la individuojn, fortigi la senton de komuneco kaj frateco, ĉar el tiu grundo povos elkreski la interkompreno, kiu estas absoluta kondiĉo de paca kunvivado. Se ni malatentas aŭ ne sufiĉe alte taksas tiun flankon de la internaciaj aferoj, ni forĵetas unu el la angulaj ŝtonoj de tiu konstruaĵo de la estonteco, kiun ni volas krei.

Mi bone konscias, ke tio, kion mi nun diris, tuŝas la regionon de la frazoj, kaj ke mi montris al io, kion oni malfacile povas konkretigi, kaj kio havas malmulte da loko en la internacia agado de la hodiaŭo. Sed mi kredas, ke neniu racie kaj objektive pensanta homo neas la valoron kaj signifon de la vidpunktoj.

Oni ankaŭ povas citi multajn laborojn en la kadro de UNO kaj ĝiaj suborganizoj kiuj estas faritaj en la spirito de la humanismo, ekz. la helpoj al la neevoluiĝintaj landoj, la batalo kontraŭ malsanoj kaj infanmortoj, la klopodoj forigi la analfabetismon kaj cetere, kiuj kompreneble havas gravan signifon.

Sed mi tamen volas substreki, ke la granda fincelo de UNO estas tiel grava, ke ni devas fari ankoraŭ pli kaj provi trovi novajn rimedojn en la pacbatalo.

Mi volas montri al la mondlingva demando.

UNESKO en Montevideo 1954 akceptis rezolucion, kiu rekonas la grandan valoron de Esperanto rilate al edukado, scienco kaj kulturo, kaj kunlabora kontakto estas starigita inter UNESKO kaj UEA. La svedaj delegitoj donis sian voĉon por la rezolucio.

Dum la sekvonta kunveno de Eŭropa Konsilantaro oni pritraktos proponon pri provinstruado de Esperanto en kvin landoj, kaj Svedujo dum la pritraktado de la demando en la Komisiono por kulturo kaj scienco subtenis la proponon.

Oni povas havi diversajn opiniojn pri la mondlingva demando. Oni povas konsideri ĝin utopia. Oni povas malakcepti Esperanton kiel helplingvon, sed oni neniam povos nei la fakton, ke Esperanto funkcias praktike, ke la lingvo estas same uzata kiel la naciaj lingvoj parole, skribe, diskute, literature ktp. ke ĉiujare 2.000 reprezentantoj el trideko da landoj jarkongresas, ke UEA havas bone organizitan konsulan sistemon en pli ol 50 landoj.

Mallonge dirite: Esperanto estas praktika instrumento je la servo de la popolfратиго. Esperanto laboras laŭ la spirito de UNO.


Ni devas tiri la konsekvencojn el nia internacia

starpunkto kaj transiri de la afablaj vortoj de la rezolucio al praktika aplikado.

Ni svedoj devas kaj morale kaj ekonomie subteni tiujn altruismajn klopodojn, kiuj celas doni al la homoj eblecon detrui la lingvajn barojn kaj nodi homon al homo.

Tio povas efektiviĝi diversmaniere, ekz. per provinstruado en la lernejoj, per ekonomiaj subvencioj al la agado, per subtenoj de gejunlara interŝanĝo kaj internaciaj tendaroj, per vojaĝaj stipendioj, per radiaj kursoj ktp.

Ne temas pri gigantaj sumoj, kiuj povas skui la



Politiken

Kumbel, pseŭdonimo de dana inĝeniero Piet Hein, estas poeto de miniaturaj poemoj, la t.n. *grukoj*, kiujn ĝuas ĉiutage legantoj de la tagĵurnalo *Politiken*, Kopenhago. Li estas dana humuristo koninda.

Pri la signifo de la vorto *Kumbel* regas ioma dubo. Eble ĝi estas pura artefaritaĵo, eble pravas la dana nobelpremiito Johannes V. Jensen, ke ĝi troviĝis jam sur antikvaj runŝtonoj (kumuloj?) kun signifo memorindaĵo. Prave aŭ ne, la vorto *meritus* esti tie, ĉar memorinda.

Ankaŭ pri la alia vorteto *gruko* regas mistiko. Eble ĝi estas kuntiriĝo de la danaj vortoj *grin* kaj *suk* (rido-ĝemo), eble maliculo pravas, ke antaŭ Piet Hein neniu prononcis la vorton — krom la perdriko!

Laŭ sia apliko *gruko* havas la signifon lirika, rezona aforismo, ĉiam kun pikanta moraleto. Ĝi estas strofeto filigrane ellaborita el universalaj ideoj per pure danaj vortludoj, foje temas pri lingva ĵonglaĵo tradukebla nur per parencaj ideoj kaj vortludoj.

Tre fekunda fantazio kaj eltro-
vemo estas distingiloj de Kumbel-

socioekonomian ekvilibron, sed pri la montrata bona volo kontribui kaj labori en la spirito de UNO. Tio povos en la daŭro de la tempo havi grandan valoron ĝuste tiel, ke la individuoj iom post iom ekhavas scion unu pri la alia kaj pri la internaciaj cirkonstancoj. Tio enigis la homojn en la aferojn.

Per tia celkonscia agado ni povos esperi, ke la premo desube iam estonte efikos ankaŭ en la salonegoj, kie la ĉefroluloj de la internacia politiko decidas pri la estonteca sorto de la homaro.

Einar Dahl

Donemo

Pri kiel doni el sia abundo
Ni homoj devas donaci ion
por helpi, apogi, fortigi.
De bonaj konsiloj disdonu do kion
vi ne povas mem praktiki.

Vivregulo

Per sekva regulo kun granda ĝojo
mi solvis jam ĉiujn problemojn:
Mi iras laŭ ora, meza vojo,
eĉ se ĝi trafas ekstremojn.

Tiel estas

Kruela estas ludo de Amoro:
Laŭ leĝo konsekvenco kaj racia
la ŝtono, kiu falas de la koro
frakasas piedfingron de alia.

Vano

Apeladi
la prudenton
estas bati
en la venton.

Konsolo

Kordoloro premas fie —
sed kolik' en ventro plie!
Tial laŭdu al Fortuno,
se el tiuj mankas unu.

Centrismo

Mi estas l'universa mezo —
logiko tion ne kontraŭas.
Subtenas al la hipotezo,
ke l'tuta resto min ĉirkaŭas.

Du stadioj sur la vojo al mondpaco

Nun mankas nur du postuloj,
kaj pacon ni estos plenumintaj:
La fido de la kontraŭuloj,
kaj ke ĉiuj montros sin indaj.

(Esperantigis: P. Th.)

Okaze de la U.K. en Kopenhago
ni invitis la aŭtoron de „Rozoj
kaj Urtikoj” verki pri dana lite-
ratura temo:

La grukoj de Kumbel

Hein, ĉar lia samtempe science klarvida kaj burleske kurioza intelekto produktis jam 12 kolektojn, kaj ĝuste la miniatura liriko ja estas plej postula. Jen estas registro de puraj ĉiutagaĵoj, inspiritaj de jarpasado, ĝis kosmaj apokalipsoj — aŭ de proverbiaj meditoj ĝis ŝerca speguligo de homa trivialeco. Danaj estas la grukoj laŭveste, sed efektive ili estas universalaj enhave. Ne mirigas, ke Piet Hein aktivas en la movado por mondfederacio.

Kumbel mem ĉiam faras karikaturojn vinjeton por ĉiu gruko, kaj cetere li transplantis multajn al sveda, angla kaj hispana lingvoj (kelkajn jarojn lastmilite li pasigis en Sudameriko).

Grave por kongresanoj ĉe la UK en Kopenhago estas, ke Piet Hein aklame permesis tradukon de siaj grukoj en la internacian lingvon. Kelkaj jam aperis — ne nur en esp-gazetoj, sed ankaŭ en la gazeto POLITIKEN, kies humura rubriko estas redaktata ĝuste de Kumbel. *Kaj li promesis, se eble, ĉiutage dum la UK prezenti al la kongresanoj en Politiken grukon en esperanta vestaĵo.* Ĝis tiam mi transdonas al la legantoj la subajn specimenojn por gustumo.

Poul Thorsen

CED

Centro de Esploro
kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, Anglujo.
Telefono ARNold 90-81

BIBLIOGRAFIO DE LA INTERNACIA LINGVO POR 1955

La kunlaboranto de CED pri literaturaj aferoj, s-ro William Auld, ĵus ellaboris kompletan Bibliografion pri verkoj skribitaj en la Internacia Lingvo kaj pri aliaj esperantaĵoj, publikigitaj en la jaro 1955.

Entute aperis 104 diversaj eroj. El tio estis: aŭtobiografio 1, biografio 1, diversaĵoj (kalendarioj, katalogoj k.s.) 6, dramoj 3, verkoj pri la Esperanto-Movado 6, romanoj kaj novelaroj 9, kantaroj 5, legolibroj 1, lernolibroj 9, poeziaj verkoj 6, nacilingvaj informaj verkoj 8, religio, filozofio, etiko kaj psikologio 9, sciencoj naturaj 2, sociologio kaj politiko 2, turismaj k.a. prospektoj 30, vortaroj 6.

En la periodo inter 1945 kaj 1955 entute aperis 903 diversaj verkoj. El tio estis: aŭtobiografio 10, belartoj 14, biografio 17, diversaĵoj 22, dramoj 12, Esperanto-Movado 48, romanoj kaj novelaroj 75, filatelio 3, geografio kaj vojaĝoj 17, gvidlibroj 11, historio 4, humuro 4, kantaroj 37, legolibroj 8,

lernolibroj 91, lingvistikaj verkoj 15, poezio 33, nacilingvaj informaj verkoj 79, religio, filozofio, etiko kaj psikologio 68, sciencoj naturaj 24, sociologio kaj politiko 54, stenografio 4, turismaj kaj aliaj prospektoj 215, vortaroj 38.

Sinjoro W. Auld esperas fini en tiu ĉi jaro la Bibliografion por la periodo 1929 ĝis 1945. Tiamaniere estos kompletigita la „Bibliografio de Internacia Lingvo”, kompilita de P. E. Stojan kaj publikigita de UEA en la jaro 1929.


DONACIOJ AL CED

	£	ŝ	p.
Stato je la 8-a de marto 1956	12	-	11 - 7
Novzelanda Kongreso, Novzelando	5	-	0 - 0
S-ino Ruth Mc. Grath, Aŭstralujo	-	-	4 - 0
S-ro F. Šlogar, Jugoslavio	-	-	4 - 9
Svisa Esperanto-Societo, Svislando	11	-	6 - 6
N.N. Nederlando	-	-	18 - 9
S-ro A. F. Doneis, Usono	33	-	15 - 6
Gesinjoroj Laurie, Britujo	-	-	10 - -
S-ro Tison, Francujo	1	-	- - -
Grupo de Angers, Francujo	3	-	- - -
S-ro Cl. Winchcombe, Aŭstralujo	2	-	- - -
Stato je la 1-a de majo 1956	70	-	11 - 1

Al ĉiuj donacintoj plej koran dankon. Specialan dankon al s-ro A. F. Doneis, Usono, pro la granda kontribuo de £33-15-6. Donacojn por CED oni povas sendi al UEA, 7 Eendrachtsweg, Rotterdam C, Nederlando, al Unuiĝo Esperantista Franca, 34 rue de Chabrol, Paris, X., Francujo, al ĉiuj ĉefdelegitoj aŭ perantoj de UEA, aŭ al CED rekte je la nomo de ĝia direktoro, 77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, England.

Frostavallen 1956

Aktivuloj anoncu vin.



La „grandsalono” de
FROSTAVALLLEN.

Sveda Somera Semajno

denove okazos en la venonta somero tuj antaŭ la Universal Kongreso en Kopenhago. La idilia loko FROSTAVALLLEN estos la loko por la altnivela kultursemajno 29 julio—4 aŭgusto 1956.

La temo de la prelego estos „La ĉefaj obstakloj al internacia kompreniĝo kaj kooperado”. En la kadro de tiu temo okazos serioj po 3 prelegoj de

Docento S. Pragano, pri „Instruado de historio en Amsterdam, Nederlando diversaj landoj”

D-ro C. Støp-Bowitz, Oslo, Norvegujo pri „Rasoj kaj rasaj antaŭjuĝoj”
Prof. G. Waringhien, Choisy-le-Roy, Francujo pri „Lingvaj obstakloj”
Prof. D-ro Ivo Lapenna, Wembley, Britujo pri „La laboro de UNESKO por forigo de la obstaklo al internacia kompreniĝo kaj kooperado”.

Sed krom tio estos novaĵo: Ĉiutage okazos diskutoj pri gravaj labortaskoj de nia Esperanto-movado. La Universalaj Kongresoj ne donas sufiĉe da tempospaco por seriozaj, trankvilaj diskutoj. Ni elektis la temojn:

INFORMADO, INSTRUADO, ORGANIZAJ DEMANDDOJ, KULTURAJ PROBLEMOJ

kaj enkondukos la diskutojn: Prof. D-ro I. Lapenna, Doc. S. Pragano, D-ro C. Støp-Bowitz kaj S-ro J. Strønne.

En la vesperoj estos distraĵoj, kromaj programeroj ktp. Entute ĉio formos tre enhavoriĉan kaj altkvalitan semajnon, kiu estos tre valora por la movado kaj ĝiaj gvidantoj.

Frostavallen, kiu situas tre proksime al Kopenhago kaj Malmö, havas tre bonan hotelon, donas abundan kaj bon-gustan manĝaĵojn kaj ĉiumaniere servas al la gastoj. Ekzistas nur 80 litoj, kaj vi devas anonci vin kiel eble plej baldaŭ.

La kosto (restado kaj kotizo) estas ĉ. sved.kr. 250 por la tuta semajno. **Dank’ al granda subvencio ĉiuj partoprenantoj pagos NUR sved.kr. 150.**

Informojn kaj aliĝilojn oni povas ricevi ĉe S-ro Jan Strønne, Amiralsgatan 36, Malmö, Svedujo.

SVEDA ESPERANTO-INSTITUTO

12a Internacia Junular-Kunveno

de la Tutmonda Esperanto-Junular-Organizo, okazonta en Büsum de la 28a de julio ĝis la 4a de aŭgusto 1956 sub la Honora Patroneco de la Prezidanto de la Germanaj Popolaltlernejoj, lia Moŝto sinjoro pastoro Nicolaus Christiansen.

La Nordmara

Banloko Büsum

situas ĉe la nazo de fertila duoninsulo, kiu kondukas kiel granda ponto en la interesan mondon de la „Watt”-oj (vatoj), tiuj grandegaj sablokampoj antaŭ la nordmara bordo alireblaj dum la mara malalto.

Büsum estas malgranda loko kun plaĉaj ruĝtegmentaj dometoj. Ĉi aspektas multkolora urbeto en porinfana bildolibro. Meze de altaj arboj staras la pentrinda malnova fiŝista preĝejo. Al tiu malmonduma Banloko Büsum venas en la somera tempo miloj da bangastoj por ĝui la avantaĝojn de la restado ĉe la bordo de la Norda Maro. Ankaŭ vi perdos vian lacecon de grandurba vivo kaj refreŝigos en la atmosfero de Büsum.

KOTIZOJ

antaŭ 1/7/56

1. ĝis 18-jaraj 41,— gm.
2. ĝis 30-jaraj 44,— gm.
3. pli ol 30-jaraj 50,— gm.
4. Ne-TEJO-anoj pagos 5,— gm. pli, ĉar TEJO transprenis la laboron de la organizo.
5. Partoprenontoj de la ŝipekskurso al la rokinsulo Helgoland pagos 10,— gm. pli.
La kotizo n-ro 3 estas nur por karavanestroj, amikoj de junularo, specialaj invititoj kaj geinstruistoj.

Bonvolu priatenti:

Anoncu vin ĝustatempe por havi la garantion de akcepto. La aliĝo validas nur, kiam LKK ricevos vian antaŭpagon (fiksita je 20,— gm.) per ĝiro al la kasistino:

s-ino Heinke Sommer, Büsum,
Poŝtĉekkonto: Hamburgo n-ro 19 93 44.
aŭ al: **s-ino H. Sommer,** Schleswig-Holsteinische Westbank, Büsum.

La kotizoj inkluzivas ĉiujn aranĝojn (escepte la ŝipekskurson al la rokinsulo Helgoland, por kiu la partoprenantoj pagos 10.— gm. pli), **ĉiujn manĝaĵojn kaj la tranoktadon dum la kunvena semajno.**

La partoprenantoj loĝos en la komfortaj ĉambroj de la „Internulejo” (Gimnazio) kaj en la hotelsimila „Hejmo de la Marista Misio”, kie oni ankaŭ manĝos.

Eksterordinare bona kaj riĉa distra programo, kaj altnivelaj kulturaj aranĝoj, estas okazontaj! Krome, oni aranĝas malmultekostan karavanon de Büsum al la 41a U.K. en Kopenhago, kie same malmultekosta loĝejo estas havebla!

PROVIZORA PROGRAMO

Sabato, 28a de julio 1956

Interkona Vespero (Strandhalo)

Jazz-koncerto: Dobrzynski-kvinteto

Dimanĉo, 29a de julio 1956

Katolika kaj Evangelia Diservoj en Esperanto

Hisado de la flagoj de la partoprenontaj nacioj, dume la orkestro de la Banl. Adm. ludos nian himnon. **Solena Malfermo** (Strandhalo)

Forflugigo de multnaciaj leterkolomboj

„Watt”-promenado kun muziko, alparolo de Neptuno. Solena Ceremonio de la „Watt”-baptado

Reiro kun ludoj kaj dancoj sur la „Watt”-o

Elektio de la „Watt”-reĝimo 1956 de Büsum

Kongresa Balo (Oficiala Balejo)

Lundo, 30a de julio 1956

Tuttaga ŝipekskurso al fama rokin-sulo Helgoland per la modernega Banloka Motorŝipo „Atlantis”

ALIĜILO

Mi aliĝas al la

Internacia Junular-Kunveno de 28/7—4/8 1956 en la Nordmara Banloko Büsum Germanio.

NEPRE SKRIBU PRESLITERE!

s-ro

s-rino

f-ino

(familia nomo)

(antaŭnomo)

(profesio en Esperanto)

(n-ro de la pasporto)

Mi ĝiris mian antaŭpagon antaŭ la 9/7 1956 al la kasistino:

s-rino Heinke Sommer, Büsum; poŝtĉekkonto: Hamburgo 19 93 44

kaj pro tio pagos entute kiel jara

Kiel Ne-TEJO-ano mi pagos pli (5,— gm.):

Mi deziras partopreni la ŝip-ekskurson

al la insulo Helgoland kaj pagos pli (10,— gm.):

Entute mi pagos:

Ĉar mi jam ĝiris la antaŭpagon la an de.....

Mi en Büsum ankoraŭ devas pagi:

Mi scias, ke mia aliĝo nur validas je la antaŭpago de 20,— gm.

Mi sendas tiun-ĉi aliĝilon: Al la Prezidanto de LKK s-ro Claus Ohlen, Rosenallee 9 III, Hamburgo 1, Germanio.

....., la -an de 1956
(loko) (dato) (subskribo)

NE FORGESU ALDONI INTERNACIAN RESPONDKUPONON!
AFRANKU NEPRE FILATELE POR NIA EKSPozICIO

Mardo, 31a de julio 1956

Eventuale aŭdigo de interesaj diversnaciaj diskoj Ĉefa Laborkunsido. Daŭrigo alian tagon.

Renkontiĝo de la Studentaj Esperanto-Kluboj kun ĉiuj izolulaj esperantistaj studentoj

Merkredo, 1a de aŭgusto 1956

Kulturaj prelegoj kaj konkursoj

Prezentado de la esperantlingva film-strio „Danlando”

Muzika Vespero (Strandhalo): Ĥoroj de kelkaj nacioj, Operarioj, „Heider Kantorei”, orkestro ktp.

Nokta Orgenkoncerto en la 514-jara Fiŝista Preĝejo

Ĵaŭde, 2a de aŭgusto 1956

Tuttaga ekskurso tra Schleswig-Holstein

Vendredo, 3a de aŭgusto 1956

Malfermo de la Internaciaj Sportkonkursoj:

Internacia Tenisa Turniro

Internacia Turniro de Padelaj Boatoj

Internacia Stafetkurado (Svedstafeto)

Fina kuniĝo de la sportontoj (Strandhalo)

Eŭropa Vespero, poste Torĉa Procesio kaj Granda Piroteknika Festo

Sabato, 4a de aŭgusto 1956

Solena Fermo (Strandhalo)

Ekveturo de la oficiala IJK-karavano al la postkunveno: (41a UK en Kopenhago/Danlando)

Radio - Babiloj

(7)

La Esperantistoj havas la
dissendojn, kiujn ili meritas

Radio Zagreb

Ĉu vi jam ĝuis la radio-ĉason tra la etero kun via dekstra mano sur la komutilo de via radio-aparato?

Tre facile kaptebla predo estas la stacio Radio Zagreb en Jugoslavujo, eĉ se la distanco inter la sendilo kaj via ricevilo estas relative granda. Almenaŭ mi en Frislando, unu el la plej nordaj provincoj de Nederlando, do sufiĉe malproksime de la sendilo, povas klare kaj forte aŭdi la Esperanto-programon de tiu stacio. Kelkfoje estas mallonga sveno; do se vi, agordinte la ricevilon je ondo 264,7 m (1133 kc), ne tuj aŭdas voĉon parolantan Esperanton, vi nepre havu iom da pacienco: tre baldaŭ vi aŭdas alproksimiĝantan inan aŭ viran voĉon, kiu aŭdigas belsonan Esperanton: la predo marŝas senreziste kaj plenkonscia en la kaptilon atendantan kaj tute ne bedaŭras la kaptiĝon. Kontraŭe! En ju pli da kaptiloj ĝi samtempe marŝas, des pli ĝi ĝojas.

La tre malfrua horo de la dissendo de la Esperanto-kvaronhoro (de 23.45—24.00 M.E.T.) estas maloportuna por tre multaj geaŭskultantoj. Foje la anoncisto de Radio Zagreb diris: „Ne plendu pri la malfrua horo! Ni ĝoju pro la okazo dissendi Esperanton dum kvaronhoro. Ĝis nun neniu mortis pro malfrua endormiĝo unufoje semajne.”

Tiu sprita riproĉeto estas nur parte prava: profesiaj aŭ sociaj devoj malfruigas la endormiĝon de multaj nuntempaj homoj plurfoje semajne; unu plia malfrua endormiĝo postulas tiam tro da energio kaj sinrego. Sendube la dissendo estus aŭskultata de multe pli da gesamideanoj, se ĝi okazus ekzemple de 21.45—22.00 M.E.T.

Malgraŭ la malfrua elsendhoru mi preskaŭ ĉiuĵaŭde aŭskultas la Esperanto-kvaronhoron de Radio Zagreb, ĉar la programoj estas interesaj, instruaj kaj variaj.

Bone kaj dankinde mi memoras la tre interesan intervjuon de d-ro Borovečki, kiu respondis demandojn pri kooperacioj. En klara Esperanto li pritraktis la relative malfacilan temon, ke ĝi estas komprenebla ankaŭ por ne-fakuloj, kiuj povis kompreni la fak-esprimojn laŭ la kunteksto.

Interesa estis ankaŭ la prelego de prof. Murah (eble mi nebone literumas la nomon de la preleginto) pri „Esperanto kaj la Blinduloj.” La limigita spaco ne permesas pritrakti aliajn interesajn dissendojn de Radio Zagreb.

La dissendo de nacia popolmuziko, kiun aŭdigas kelkfoje ankaŭ propralantaj radio-stacioj, laŭ ni ne estas tiom necesa. En Esperanto-programo ni preferas aŭdi Esperanton.

Radio Valencia

Aŭskultonte la stacion Radio Zagreb, oni povas jam unu kvaronhoron pli frue (23.30 M.E.T.) klopodi kapti la stacion Valencia (Hispanujo) je ondlongo 200 m (1500 kc). Ĝia Esperantoprogramo daŭras duonhoron, do ĝis noktmezo. Ĝis nun mi ne sukcesis „predigi” ĝin, sed eble vi estos pli bonŝanca. Sukceson!

S. S. de Jong

41-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Kopenhago - Danlando

4. aŭgusto - 11. aŭgusto 1956

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 7

Majo 1956

Adreso: 41-a Universala Kongreso de Esperanto, Kopenhago, Danlando.

Banko: Handelsbanken, Kopenhago, Danlando.

Poŝtgirkonto: 41-a Universala Kongreso de Esperanto, n-ro 97820, Kopenhago, Danlando.

Aliĝlimigo: Pro la rapida kresko de la aliĝintoj, ni atentigas, ke post la atingo de la limcifero de 2.200 kongresanoj plu ne estos akceptataj aliĝoj.

Reklamiloj: Reklamiloj en Esperanto povas esti liverataj al la kongresanoj kun la Kongresa Libro kontraŭ pago de la poŝtelspezoj.

Kongresa Libro: Ĝi estas en preparo por sendado al la kongresanoj komence de julio. Limdato por anoncoj kaj informoj estas la 15-a de junio.

Gazetara Servo: Rajtas ricevi la bultenojn de la Gazetara Servo esperantistoj, kiuj anoncas sin al la Kongreso kun legitimo de nacilingva aŭ esperantista gazetoj.

Antaŭkongreso: LKK rekomendas partoprenon en la Oficiala Antaŭkongreso en Helsinge 28/7—4/8 1956. Anoncu vin ĉe: L. Friis, Ingemannsvej 9, Åbyhøj, Danlando.



Postkongreso: LKK rekomendas partoprenon en la Oficiala Postkongreso en Malmö 11/8—12/8 1956. Anoncu vin ĉe: Esperanto-kongreso, Malmö, Svedujo.

Afiŝo: Turisma Asocio de Danlando okaze de la Kongreso eldonis grandan afiŝon pri Danlando. Ĝi jam estis sendita al oficialaj instancoj.

Statistiko: (ĝis fino de aprilo) Alĝerio 2, Argentino 1, Aŭstralio 5, Aŭstrujo 16, Belgujo 8, Brazilo 3, Britujo 149, Bulgario 2, Ĉeĥoslovakujo 2, Danlando 320, Finnlando 99, Francujo 161, Germanujo 178, Grekujo 3, Hispanujo 11, Islando 23, Izraelo 2, Italujo 125, Japanujo 1, Jugoslavio 89, Kanariaj Insuloj 1, Kanado 2, Kongo Belga 2, Maroko 15, Meksikio 1, Nederlando 106, Norda Rodezio 1, Norvegujo 97, Novzelando 1, Portugalujo 2, Sovetunio 1, Svedujo 344, Svisujo 25, Turkujo 2, Usono 15, Venezuelo 1. Sumo: 1816 el 36 landoj pasintjare 1399 el 31 landoj).

GIAN CARLO FIGHIERA
Konstanta Kongresa Sekretario

+++++

Oni povas helpi . . .

Pro la kreskanta intereso pri nia lingvo inter la junularo en Hungarujo, la samideanoj estas petataj sendi skribaĵojn kaj bildojn pri la vivo de 14-18-jaraj gelernantoj en diversaj landoj (kiel ili vivas, kion lernas, legadas, kiel ili amuziĝas, pri ŝatataj libroj, filmoj, sportoj, dancoj ktp), ankaŭ pri instruaj metodoj, al: S-ro L. Böti, Rigo-u. 24c, Szeged, Hungarujo. Antaŭdankon!

Por povi doni flugfoliojn al eksterlandanoj vizitantaj Hungarlandon aŭ vivante ĉi tie, ni ĝojus, se el aperantaj diverslingvaj flugfolioj, propagandiloj, vi sendus kvanteton al la Hungara Landa Esperanto-Konsilantaro, al adreso de la refer. por internacia kontakto: Pál Balkányi, Budapeŝt 54, M. Nemzeti Bank. Ankau afiŝojn ni povas uzi.

Germanujo. Samideanoj povas subteni la laboron de niaj kolegoj en Orienta Germanujo per donaco de verdstelaj pingloj, por ke la homoj vidu, ke la esperantistoj ekzistas. Helpemuloj sendu al: S-ro Kessler, Kieler Strasse 28, Dresden-Klotzsche, Germanujo (DDR).

Bulgarujo. Fondiĝis en Sofia ŝtata Universitato studenta esperanto-rondo kun 15 anoj. Oni havas kontakton kun la universitatoj en Moskvo, Kopenhago kaj Brno. Oni deziras plivastigi siajn kontaktojn por seriozaj celoj. Skribu al: Esperanta Studenta Rondo, per D.C.H.M., Sofia ŝtata Universitato, Sofio, Bulgarujo.

La Granda Koncerto

Kun ilustraĵoj de la aŭtorino

Ĉu vi kredas aŭ ne, mi dezirus konduki vin al mirakla monto. Jes, ĝi ŝajnas mirakla, ĉar ĝia alto varias laŭ fantazio de la surpriranto. Estas, kiu asertas, ke ĝi etendiĝas ne pli alten ol simpla monteto; alia troige emfazas, ke ĝi pikas eĉ la ĉielon per sia pinto; fine troviĝas, kiu entute neas la ekziston de la mirakla monto, ĉar tiun nek interesas, nek ĝenas la alto kaj tiu ĉiam kontentiĝas pri sia collarĝa horizonto. Tia estas la vivo: por formiko povas ŝajni pugnogranda terbulo la — *Himalajo* mem, dum la aglo, nestanta sur supro de montgiganto, flugante vidas ĝin simpla monteto.

Nu, sed ne pri tio temas.

En la valo ĉe la piedo de tiu mirakla monto situas vilaĝo, tra kiu mil jarojn uzata larĝa vojo kondukas dudirekten: de okcidento al oriento en la landon de Sunleviĝo kaj de oriento al okcidento en la landon de Sunsubiĝo. Pri distanco inter la du landoj same varias opinioj, kiel pri la alto de la mirakla monto. Estas, kiu taksas la vojon nur kelksemajne daŭra; alia pensas ĝin longa kiel la ekvatoro mem; fine troviĝas, kiu neas la ekziston de distanco inter la landoj, ĉar senmove starante sur sama loko oni ja vivas jen en la lando de Sunleviĝo, jen en tiu de Sunsubiĝo laŭ rondiro de la ardanta disko, sekve eĉ tiuj du landoj ne povas esti troveblaj. Tia estas la vivo: por betulo, radikigiĝinta en la tero, la vivo ŝajnas esti plena en senmoveco, sed por ĝiaj falintaj folioj, pelataj laŭ kaprico de vento, la flugo neniam havas finon.

Nu, sed ne pri tio temas.

En tiu vilaĝo ĉe piedo de la mirakla monto, apud la miljara vojo, vivis centmetia hometo. Oni nomis lin „centmetia“, ĉar li konstante okupis sin per fabrikado de tiaj objektoj, instrumentoj, kiuj ofte vekis miron, eĉ admiron inter

liaj samvilaĝanoj. Kompreneble la kritikemo ne samvalore parolis pri li. Iuj opiniis, ke li estas stranga artifiko; aliaj diris, ke li estas artifika strangulo; la plimulto konsente konstatis, ke li estas nur — maniulo sin amuzanta. Verdire, li estis hometo, kiu deziris pruvi *por si mem*, ke la homa ekzisto havas destinton daŭrigi la kreadon eĉ sen certa scio pri la fina celo. Miaopinie la tri diferencaj pritaksoj egale pravis: strange artifika maniulo li estis.

Foje nia stranga hometo surprizis siajn samvilaĝanojn per artefarita birdo. Fakte ĝi montriĝis kurioza kreaĵo; ĝia eksteraĵo vetpompis kun la plej eleganta plumaro de la ekzotikaj birdoj, ĝiaj movoj vekis plenan iluzion pri vivanteco, ĝia flugetado ŝajnis esti facila kiel flirtado de papilioj kaj rapida kiel svingoj de flugantaj hirundoj. Do ne senkaŭze oni primiris ĝin kaj eĉ tiuj, kiuj pensis lin simpla maniulo, estis devigataj konfesi al si, ke tiu artefarita birdeto ravas ilin.

— Tre domaĝe — rimarkis unu el la gapantoj — ke ĝi ne kapablas trili kiel la kanario aŭ imiti la fajfokanton de alaŭdo. Se almenaŭ ĝi povus kvivitadi kiel ordinara pasero, certe ĝi estus perfekta birdo.

Aŭdinte tiun rimarkon nia centmetia hometo rekonis la mankon de sia artifika kreaĵo, ĉar vere la artefarita birdo estis muta. Li tuj decidis ne montri plu la birdon ĝis invento de aparato, kiu malfermos la bekon de lia birdeto je tia varia trilo, kian havas neniu birdo sur la tero. Li retiris sin en sian modestan dometon por komenci la mensostreĉan penadon.

Pasis longa, longa tempo. La vilaĝanoj jam forgesis pri lia mirveka birdeto, eĉ pri li mem oni ne multe parolis, kiam dum iu maja vespero preterpasante lian domon oni aŭdis rave belegan birdotrilon,

filtrigantan tra la fendoj de lia dompordo. La scivolemaj vilaĝanoj haltis por aŭskulti. Ilia miro pliiĝis, ĉar la triloj variis tiel sorĉe, ke tiuj ŝtelis sin en la koron de la aŭskultantoj vekante dolĉe pacan senton kaj forlulante ĉiun malican penson.

— Miraklo! La artefarita birdo kantas — la jubila krio eliĝis el la gorĝoj. — Neniu el la naturaj birdoj povas trili tiel bele!

Depost tiu tago la vivo de la vilaĝanoj nur ŝajne restis sama; la taglaboro laŭkutime daŭris, la zorgoj ne malpliiĝis, tamen ĉiuvespere, kiam la silento disensterniĝis, la foliaro de arboj ne plu susuris, tiam la zorgpremitoj venis al la dometo de la centmetia hometo por aŭskulti la sorĉan trilon, kiu konsolis la ĉagrenitojn, refreŝigis la laciĝintojn, sugestis belajn sonĝojn al tiuj, kiujn la dormo longe evitis, eĉ faris pacon inter najbaroj, kutime kverelantaj unu kun la alia.

Nia modesta hometo sidadis ĉe la sojlo de sia dometo, lia rigardo vagis ie al la foro, en lia kapo skiziĝis fantaziaj bildoj pri feliĉigo, disiranta en la tutan mondon. La ĝojo kaj admiresprimoj de liaj samvilaĝanoj ne igis lin vanta.

— Mi plenumis nur devon — li ripetadis kun milda rideto.

Iom post iom oni alkutimiĝis al la ŝanĝita humoro, al la paca sereno, kiu ĉiam pli karakterizis la vivon de la vilaĝo. La sorĉa birdotrilo jam tiel apartenis al tiu vivo, ke oni eĉ ne plu rimarkis ĝin, pli precize dirante oni estus rimarkinta nur ĝian eksilenton.

Foje okazis, ke pompe vestitaj kavaliroj rajdis en la vilaĝon por heroldi pri proksimiĝo de Lia Reĝa Moŝto en la lando de Sunsubiĝo. Ili kunvokis la vilaĝanojn per laŭta trumpetado al la vilaĝmeza placo kaj anoncis, ke la reĝo honoros ilin per sia vizito, volonte ak-

ceptos la vilaĝestron, priaŭskultos iliajn dezirojn, donos helpon al la nenihavuloj, sed li pretendos festenan regalon por sia sekvantaro. La kavaliroj rajdis plu.

La vivo de la vilaĝo ŝanĝiĝis kiel tiu de skuita abelujo. Ĉiu beligis sian domon, ĉar eble Lia Reĝa Moŝto havos emon viziti ĝuste la lian; ĉiu vestis sin per plej bela vesto, ĉar, kiu povas scii, eble Lia Majesto distingos lin per sia alparolo.

La famo pri la alveno de la reĝo atingis ankaŭ nian centmetian hometon, tamen li ne beligis sian dometon havante nenion per kiu ornami ĝin kaj li ne vestis sin per parada vesto ne havante alian krom la ununura sur si, sed mi povas aserti, ke neniu tiel kore atendis la reĝon kiel li. Jen alvenos fine la okazo por efektiviĝo de lia revo! Li iris al la vilaĝestro kaj transdonis al li kesteton forte ŝlositan.

— Donu ĝin al Lia Reĝa Moŝto!

Vane oni demandis lin, kion enhavas la kesteto, li respondis ne per vorto, sed nur per enigma rideto.

— Nur faru tion, kion mi diris — li refoje petis kaj ekiris hejmen.

Kun varma espero li atendis en sia dometo je alveno de la reĝa sendito, kiu certe venos por voki lin al la majesta vizitanto. Certe la reĝo vokos lin, ĉar la ŝlosilo de la kesteto kaŝiĝas ĉe lia brusto en leda saketo, pendanta ĉirkaŭ lia kolo.

La reĝo alvenis. La sonojn de la trumpetoj, hufklakadon de la rajdantoj, bruon vivuadon de la vilaĝanoj la vento alportis ankaŭ al lia dometo. Li atendis. La tempo malrapide pasis, eĉ vesperiĝis, sed neniu frapetis ĉe lia dompordo. La nokto alvenis, kiam la vilaĝestro transpaŝis lian sojlon portante kun si lian kesteton sub la mantelo. Li metis ĝin antaŭ lin.

— Lia Reĝa Moŝto dankis vin pro la donaco. Li ordonis al siaj servistoj, korteganoj, eĉ al sia trezoristo la malfermon de la kesteto, sed nek ili, nek la plej lerta seruristo kapablis malfermi ĝin. Tial li resendis ĝin al vi dirante, ke li ne povas utiligi ĝin. Tamen

li ne koleras, eĉ certigas vin pri sia plej alta bonvolo.

La centmetia hometo mire streĉis siajn okulojn. Ĉu eble, ke la reĝo ne interesiĝis pri la homo, kiu malgraŭ sia senrango deziros doni donacon al potenculo? Ĉu eble, ke li ne deziris paroli kun li, kiu certe ja havas la ŝlosilon de la kesteto? Kion fari? Li pensis, ke eble la scivolon de potenculo ofte paralizas la laŭta festena bruoj. Li remetis la kesteton al ĝia antaŭa loko. La espero pri la granda okazo ne velkiĝis en li. Certe ĝi devos veni kaj iam estos momento, kiam li povos malfermi la kesteton antaŭ la mondo kaj ne sole la samvilaĝanoj, sed la loĝantoj de aliaj landoj povos aŭskulti la dolĉan, sorĉan trilon de la artefarita birdo. *Ho tiam oni estos kontentaj, bonaj kaj feliĉaj!*

Li eksidis ĉiumatene sur sian sojlon, atende observadis la larĝan vojon. Estas neeble — pensis nia centmetia hometo — ke tiu kreaĵo, en kiu ja vivas lia tuta animo kaj per kiu li celis feliĉigi la homojn, restu kaŝite senutila por tiuj, al kiuj li destinis kaŝite ĝin.

La Ĉiela Sinjoro registras la dezirojn de la bonaj homoj en grandan libron kaj ili plenumiĝas

laŭvice. En bela printempa tago denove kurieroj alvenis en la vilaĝon. Nun la Brila Suvereno de la lando de Sunleviĝo estos vojaĝanta tra la miljara vojo. Nia hometo zorge purigis la kesteton. Ĝi estis ja polvkovrita dum la longa atendado. Denove li portis ĝin al la vilaĝestro, petante lin transdoni la donacon je lia nomo, kaj menciis lian servopretecon, al la Brila Suvereno.

Denove li intencis atendi hejme la momenton, kiam la Brila Majesto bonvolos vokigi lin al si. Li atendis, atendadis. La gaja vivuado ĉe la akcepto, poste la feliĉa bruoj de svarmantoj en la radioj de la reĝa suno atingis lian dometon kaj li esperis, esperis ĝis la vespera silentiĝo de ĉia akklamado, sed tiam la terura silento preskaŭ sufokadis lin. Tiu silento ŝajnis al li profunda kiel la maro kaj lin ne atingis plu la flustro de arboj, nek la silka susuro de la herboj, eĉ ne la vespera ĉirpado de grilo sub la sojlo. Alifoje ili donis tiom da ĝojo al li! La espero formortis en lia koro, sur liaj vangoj disfluis morta palo.

Apenaŭ li rimarkis, ke la pordo malfermiĝis kaj en ĝia kadro aperis la kripla stultulo de la vilaĝo. Li lame proksimiĝis al li kaj ĵetis



rompitan objekton al liaj piedoj. Nia hometo senkomprene rigardis al li.

— Nu, mi reportis la keston al vi — li komencis klarigi. — La reĝo tre koleris, ĉar li ne povis malfermi ĝin. Fine li rompis ĝin. Jen!

— Kio okazis al la birdo? — kvazaŭ vekriis la centmetia hometo.

— Ĉu birdo? — la kriplulo stulte ekridis. — Birdo, birdo, montru ĝin!

Kun tremantaj manoj nia home to serĉis ĝin kaj larmoj ekfluis, kiam li trovis ĝin senplumigita, difektita. La subtile skulptita kreaĵo falis el liaj manoj.

Delonge oni forgesis pri la vizito de la altranga gasto. Komence la vilaĝanoj rimarkis, ke la sorĉa trilo mankas, sed eksciinte laŭ rakonto de la stulta kriplulo, ke la artefarita birdo frakasiĝis, ili ne plu interesiĝis pri tio. Tiel la vivo de la vilaĝo daŭris ŝajne same; oni ne multe atentis pri la oftigo de kveleroj, pri plipeziĝo de la zorgoj, kaj la mankon de kora gajeco oni konsideris natura apartaĵo de la homa vivo. La centmetia hometo ne plu montris sin inter ili kaj ili forgesis pri li, pri lia birdo artefarita sed iam trilinta. Li ne mortis, trasuferis la trompiĝon kaj lia kora vundo cikatriĝis dum paso de la tempo, la plej bona kuracisto. Li ne plu atendis reĝojn, eĉ la preterpasantoj ne interesis lin. La detruita birdo kuŝis tie, kien li faligis ĝin. Negrave, li pensis, unu pli el rompitaĵoj revoj.

Foje iu ekfrapis lian pordon. Li eĉ ne memoris, kiam iu el la vilaĝanoj ekinteresiĝis pri li. Eĉ nun ne konato, sed pretervaganta migranto haltis ĉe lia pordo por peti glaseton da akvo. Volonte li alportis la petitan refreŝigaĵon.

— Jen, ĝi servu je via sano — li diris etendante la glason al la migranto, kaj subite li ĝojis, ke jen fine li havas iun, al kiu li povas paroli. Vere, li jam pensis sin muta en la amara soleco. — Bonvenon, migranto, paŝu en la domon! Ripozu iomete, pasigu kun mi la vesperon kaj tranoktu ĉe



mi, se estos laŭ via plaĉo.

La longa marŝado lacigis la migranton kaj li tre ŝate cedis al la bonkora invito. Ĉe la tre simpla verspermanĝo nia centmetia hometo distris la fremdulon per rakontado de sia vivhistorieto. Ju pli daŭris la historio, des pli la gasto vigliĝis. Ili ambaŭ forgesis pri la paso de la horoj. Jam mateniĝis, kiam lia rakontado finiĝis.

— Poste kio okazis al tiu mirinda birdo? — la fremdulo interesiĝis kun ekbrilo de scivolo en la okuloj.

— Jen ĝi kuŝas tie, kien ĝi falis el miaj manoj. Kiel vi vidas, ĝi frakasiĝis en kelkajn pecojn.

La fremdulo ne bedaŭris la penon por kolekti la rompitaĵojn kaj metis ilin antaŭ la mastron.

— Faru ĝin denove! Ho, kiel mi dezirus aŭdi ĝian triladon, li petis.

La centmetia hometo longe heditis, tamen la persista peto de la migranto, la dolora observado de la rompitaĵoj, vekis refoje revon kaj kreosopiron en lia koro.

— Bone, mi denove faros ĝin, sed vi devos atendi por ĝi. Nu, se

vi havas emon, ĝis la pretigo vi povos loĝi ĉe mi, per okaza laboro gajni vian nutraĵon en la vilaĝo aŭ se estos laŭ via deziro, vi povos amikiĝi kun la gejunuloj de la vilaĝo.

La migranto konsentis, ĉar li tre scivolis pri tiu artefarita birdo, kiu kapablos eĉ triladi.

Pasis tagoj, kiujn nia hometo profitis por sia granda laboro. Fakte li rejuniĝis pro la koro- kaj menso-stimula okupado. Jen denove li havis celon. Eble, eĉ verdire, la rekrea birdo ne multe utilos por reĝoj kaj por popoloj — li pensis — sed tamen ĝi donos feliĉon al soleca migranto. El tagoj fariĝis semajno, el semajnoj eĉ monato, sed la mirinda birdo ankoraŭ ne estis finfarita. La migranto jam plurfoje diris, ke li deziras marŝi plu, sed ĉiufoje nia hometo petegis al li por plua prokrasto de la decido.

— Ho, atendu nur unu tagon, nur unu solan! — kaj por la laboro li oferis ankaŭ la noktojn.

La migranto sciis tion, ĉar li kelkfoje spionadis tra la ŝlosiltruo

por lerni ion el la mistera scienco de sia gastiganto. Fine lin tedis la atendo, la ĉiama prokrasto.

Ĝuste mateniĝis, kiam nia centmetia hometo finis sian laboron. Li estingis la kandelon, prenis al si la kesteton kun la rekrea birdo kaj ekiris por veki sian gaston. Vane li serĉis lin, ĉar li trovis ĉie nur lian malvarmiĝantan lokon. Fine li ekkonsciis pri sia malfruiĝo. Jen la mirinda birdeto ne havas valoron eĉ por nenihava migranto.

La trompiĝo efikis fatale. Semajnoj jam pasis, kiam en la unua fojo li forlasis sian dometon kaj surprizite vidis la vilaĝon tute fremda por si. Eĉ la dometo, en kiu li vivis jardekojn, sian tutan vivon, ŝajnis esti fremda kaj fremdiĝis ankaŭ la arboj, floroj. Li ja vidis la samvilaĝanojn, sed li iĝis tro indiferenta por rekoni kaj saluti ilin. Li decidiĝis, kaj vindinte la kesteton en tukon, ŝtelis sin en la dense nigran nokton. Li ne deziris, ke iu vidu lin forlasanta la hejmon, al kiu li volis reveni neniam.

Li ekiris, sed ne sur la larĝa miljara vojo, kondukanta orienten kaj okcidenten. Ĝuste el tiuj direktoj venis tiuj, kiuj neniigis lian esperon, detruis lian revon. Senplane li ekvagis al la denso de arbaro, kiu kvazaŭ barile ĉirkaŭis la piedon de la mirakla monto. En tiu densejo mankis vojetoj; por antaŭeniri li mem devis fari paŝojn por si. Tagoj, noktoj varie sekvis unu la alian, sed li ne atentis la rondirojn de la suno kaj luno. Premante al si preskaŭ spasme la kesteton li daŭrigis sian marŝon antaŭen kaj li ne konsciis pri tio, ĉu lia direkto estas rekta, kurba, kondukanta supren aŭ malsupren. Negrave! Negrave! Nur antaŭen!

Foje tamen li returnis sin kaj li surpriziĝis pro la vidaĵo: la konfuza arbara densejo postrestis, sube, tre fore videbliĝis longa, fendika blanka strio kaj apud ĝi koloraj skatoletoj, ne pli grandaj ol colkvadratoj. Jen la dudirekta vojo kaj la forlasita vilaĝo. Homoj, eĉ formiko-grandaj, ne mon-

triĝis. Li sentis sin izolita for de tiu mondo. En tiu soleco sereniĝis lia humoro, kvazaŭ ŝvebanta feliĉo superombrus lin kaj post tiom da tempo rideto aperis ĉe liaj lipoj, ĝojo ekbrilis en liaj okuloj. Li rigardis antaŭen kaj li rimarkis sunorumitan montoflankon kun floroj, kiaj ne ekzistas en la valo, sed la supron de la monto li ne vidis. Ĝin kaŝis nebulo, simile densa al denso de la arbaro. Negrave! Antaŭen! Per facilaj paŝoj li ekiris al la vualita nekonata pejzaĝo.

Longe li vagadis en la nebula regiono. Strange, ke la marŝo ne lacigis lin kaj li sentis nek soifon, nek malsaton. Subite, ĉe kurbo de la vojo, trefarita de li mem, kvazaŭ li estus fortirinta la nebulkurtenon, jen aperis antaŭ lia rigardo — vasta, kurioza altano kun centoj, eble kun miloj da ŝtonegoj, lumigitaj de fosforeska verda helo. Sur la ŝtonegoj sidis homoj, junaj kaj maljunaj en diversaj vestoj kaj eĉ en ĉifonoj kaj antaŭ ĉiu ĉe la piedoj troviĝis kesteto malfermita, sur kies rando sin balancis birdo kantanta.

Nia centmetia hometo kvazaŭ somnambule eksidis sur proksiman ŝtonegon, metis sian kesteton al siaj piedoj kaj ravite aŭskultis triladon de birdo de sia najbaro blankhara kaj longbarba.

— Ho, kiel bele kantas via birdeto — nia hometo esprimis sian admiron. — Rigardu, jen ankaŭ mi havas birdeton!

Li malfermis sian kesteton kaj la rekrea pompa birdeto tuj eksaltis sur la kestorandon kaj komencis plengorĝe ĝojaklame triladi. Tiel sorĉe, tiel korkapte variis ĝia trilado, ke la kapo de ĉiu sidanto turniĝis al ĝi. Sur la vizaĝoj aperis aproba sereno kaj la longbarba najbaro de nia hometo bonanime laŭdis ĝian kanton.

— Ankaŭ via birdeto belege trilas. Ĝia voĉo bone harmonias kun tiuj de la aliaj birdetoj. Vere, ĝi estas belvoĉa birdeto!

— Ĉu vi deziras interŝanĝi ĝin kontraŭ la via?

— Neeble kaj estus sence. Ĉe fremda mastro ĉiu birdo perdas sian voĉon. La birdotrililo ja estas eĉo de la mastra animo.

Post longa silento nia hometo modeste demandis:

— Diru, kion vi faras ĉi tie? Ĉu antaŭlonge vi alvenis?

— Diverstempe ni alvenis. Estas, kiu sidas sur sia ŝtonego jam jarmilojn kaj estas, kiu — kiel vi — ĵus alvenis. Rigardu, kiom da vakaj ŝtonegoj atendas mastrojn! Ĉiu alveninto alportas novajn sonojn por kompletigi, perfektigi la grandan koncerton kaj ni, sidantoj, atentante ĝojas pri la ĉiam pliiganta harmonio. Ni antaŭvidas, kiam la granda koncerto superos per sia harmonia forto la kofonion de la ekstera mondo, komenciĝos nova epoko por la homoj. Ili estos vartataj en la lulilo de la kora feliĉo, regos paco sur la tero.

El la Frisa Poezio

REVOJAĜO HEJMEN (Weromreis)

MARTEN SIKKEMA

(G. A. G. Meerburg, 1918)

Jen nia land': aŭtunnebuloj
palgrizaj sur fosaĵoj nun.
Kanalaj, mueliloj, turoj
sen pint', — intimaj ekde l' jun'.

Kiom valoras tra la jaroj
la mirigaĵoj de vojaĝ'?

Senkaŭze muĝas la arbaroj,
briletas mont' — sen avantaĝ'.

La lingvoj kaj la landoj fremdas,
jen trajnalven', jen ŝipo for.
Ni, kvankam Dio panon sendas,
hejmveas kun ŝirita kor'.

Se mokus ni l' patrujon nee,
ni restus de Frisland' infan'.
Se peius ŝtormo nubojn ree
ni albordiĝus kiel flos-kan'.

Kaj sciis ni, ho sent' spontana,
kun stjelp', herbejoj en refand':
ĉiu vojaĝo estas vana,
krom tiu al la patroland'.

trad. H. Vermuyten

*frisdevena neologismo: farmdomo kun loĝejo, fojnejo kaj staloj sub unu tegmento (laŭ la frisa s-ano S. S. de Jong Dzn., kiun ni krome dankas pro la kontrolo.) — Trad.

„SE MI SCIINTUS, KE VI VENOS . . .”

Kion vi pensas pri ĉi tiu frazo? Vi eble koleriĝos kaj ekkrios: „Jen alia novaĵo, kiu estas tute nenececa kaj kontraŭas la fiksitajn regulojn de Esperanto.” Sed antaŭe permesu al mi klarigi la situacion.

Ĉiu grupestro, kiu regule tradukas nacilingvajn tekstojn kun sia grupo, pli-malpli frue renkontos malfacilaĵojn en la ĝusta kaj eleganta prezentado de la kunmetitaj verboformoj. Se li estas precizema, li konsultos la klasikajn librojn pri gramatiko kaj stilo, sed liaj duboj ne malaperos; ili nur pligrandiĝos, ĉar la konsiloj, kiujn li trovos, parte ne sufiĉos kaj parte ne kontentigos lin.

En „LINGVO STILO FORMO” K. Kalocsay skribas (p. 84): „Ĉi tiuj formoj pro sia longeco impresas min ĉiam peze kaj tede, mi vere kompatas la bedaŭrindajn frazojn, kiuj trenas sur siaj piedoj tian ŝarĝon: verbojn longajn je duonlinio.” Kalocsay poste parolas pri la malbeleco de kunmetitaj formoj kaj fine deklaras, ke „ilia deviga uzo farus la lingvon tre malfacila por tiuj, kies lingvo ne konas tian precizan tempodistinkon. Esperanto havas tri tempojn: la nuntempan, la pasintan kaj la futuran. Bona stilisto povas ĉion esprimi per tiuj ĉi tri tempoj”. Li sugestas la uzon de „ĵus”, „jam”, „post kiam” kun la simpla preterito kaj similajn metodojn por la aliaj tempoj por eviti la kunmetitajn formojn, kiuj faras la tekston „enua, longmaniera, peza, plumpa, maleleganta kaj teda”.

Mi konsentas kun Kalocsay pri la faktoj, sed nek pri la argumentado nek pri la rimedoj. Kalocsay kredeble trovas la longajn formojn tre malagrablajn, ĉar li faras kaj tradukas versojn. Sed la argumentado estas malĝusta; se iu lingvo laŭregule kaj laŭkutime esprimas certajn tempojn per kunmetitaj formoj, la personaj sentoj de la lingvanoj ne estas sufiĉaj

kialoj por ŝanĝi ilin. Se ili volas, ili povas uzi aliajn formojn, kondiĉe ke ili estas permesitaj per la gramatiko kaj donas la saman rezulton. Sed la rimedojn, kiujn Kalocsay sugestas, mi certe refutas, ĉar mi ne trovas la saman sencon en frazoj enhavantaj „ĵus”, „jam”, „post kiam” kun la simplaj formoj kiel en frazoj, en kiuj la kunmetitaj formoj estas uzataj. Sed la plej grava manko en la artikolo de Kalocsay estas la fakto, ke li tute prisilentas tiun kunmetitan formon, kiu estas la plej ofte uzata kaj la plej necesa, nome la kunmetitan kondicionalon (*perfekta preterito kondicionala* laŭ la Plena Gramatiko): „Se mi estus sciinta, ke vi venos, mi estus bakinta la kukon!” La „ruzaj” rimedoj, kiujn li sugestas, helpas nin en tiaj okazoj ankoraŭ malplie ol en la aliaj.

Mi ne estus justa, si mi ne citus la respondajn paragrafojn de la Plena Gramatiko, kies kun-aŭtoro Kalocsay estas. Ili helpas nin surrigardi la tutan amplekson de la problemo.

Kvankam §§ 229 kaj 240 ripetas la dirojn de la citita artikolo en „Lingvo, Stilo, Formo” kaj § 365 RIM III asertas, ke laŭ la ekzemplo de Zamenhof kaj Kabe kaj aliaj bonaj aŭtoroj la kompleksaj verboformoj estas laŭeble evitindaj — § 376 RIM V (p. 323) instruas: „Zamenhof kaj slavaj verkistoj ofte uzas kondicionalon simplan anstataŭ perfektan. Tio neniel estas aprobebla, ĉar ĝi ofte estigas konfuzon pri la tempo. Ekzemple: *Se la esperantistaro konjektus, ke la Delegacio havas la rajton reformi, certe ili ne laborus por la Delagacio*. Tie ĉi oni komprenas, ke la esperantistoj ne suspektas kaj laboras, kvankam ili ne suspektis kaj laboris. Do devas teksti: *Se... estus suspektintaj... ne estus laborintaj* (kp. ankaŭ la du lastajn alineojn de § 227, p. 187).

Ĉi tio estas klara kaj korekta; sed la sama paragrafo daŭrigas: „Por eviti la tro pezan duoblan formon kompleksan, oni povas uzi la simplan formon kondicionalan en la subpropozicio kaj lasi la

difinon de la tempo al la ĉefpredikato sola. La ĝusta formo de la supra frazo do estas: *Se la esperantistoj suspektus... certe ili ne estus laborintaj*.” Mi jam diris, ke mi ne povas konsenti kun tiaj solvoprovaj.

Mi konsentas kun Kalocsay pri la faktoj. Eble mi estas iomete influita per liaj argumentoj pri kiuj mi ĉiam pensas, kiam mi formas kunmetitan kondicionalon. Sed per kio ni povas anstataŭigi ĝin? Mi sugestas formon, kiun mi ne konsideras kiel neologismon; ĝi estas laŭregule formita, sed laŭ mia scio ankoraŭ ne estas uzita. La formo estas: *mi sciintus*. *Sciinta*, estante adjektiva formo de la verbo, povas esti ŝanĝata en verbon per la verba finaĵo, same kiel de *grava, necesa, rapida* estas formataj *ne gravas, necesas, mi rapidas*. Do, *mi sciintas* estas la samo kiel *mi estas sciinta, mi sciintus* la samo kiel *mi estus sciinta*. Mi ne sugestas la uzon de aliaj formoj krom la lasta (por esprimi la „fiktivan kondicionalon en la inteco”), kvankam sammaniere oni povus facile anstataŭigi ĉiujn kunmetitajn formojn. Ŝajnas al mi, ke la neceso estas pli granda en ĉi tiu okazo ol en ĉiuj aliaj.

La procedo ne estas sen precedento. Unue mi mencias, ke la angla kaj germana lingvoj en certaj kazoj anstataŭas la pezan kondicionalon per la malpli peza subjunktivo (ekz. if I had, if I were, if I knew... wenn ich hätte, wenn ich wäre, wenn ich wüsste). En Esperanto la formo plej simila al la subjunktivo estas la volitivo, kiu ne povas esti uzata en ĉi tiuj okazoj. Sed ekzistas en Esperanto mem precedento koncerne la formadon de tiaj formoj. Plena Gramatiko (§ 231, p. 189) mencias kelkajn proprajojn en la stilo de Grabowski kaj inter ili la pasivan formon: *Laŭdatu Jesu-Kristo*. Ĉi tie ni vidas la verban finaĵon *u* aldonita al participo, en ĉi tiu kazo la pasiva prezenca participo. La Plena Gramatiko komentas pri la formo: „Tia kunmetado estis tiel konforma al la konstruo de la lingvo, ke ĝi estis plurfoje kaj plurorigine proponita.”

Oni ne diru, ke la populara kanto „If I knew you were coming I'd have baked the cake” estas pruvo kontraŭ mia opinio, ke ankaŭ la subpropozicio devas montri perfektan tempon, Ĝi enhavas duoblan anstataŭigon, unue la jam menciitan uzon de ne-kondicionala formo, due la familieran uzon de ne-kunmetita tempo. La lasta estas idiomaĵo kiu ne povus esti imitata kun aliaj verboj; oni ne povus diri: „If he informed me in time, I would have come.”

Mi ĝojus, se mia sugesto trafus la konsenton de la samideanoj. Mi ne farintus ĝin, se mi ne estus certa, ke ĝi estas laŭregula, praktika kaj belsona. ¹⁾

F. I. Wiener

¹⁾ Jen simpla ekzemplo en versoj; kiel vi esprimus la ideon pli klare, precize kaj mallonge?

Se mi ion ajn sciintus
Pri la morto de l' najbaro,
Certe tuj mi revenintus
Per rapida vagonaro.

FRANCUJO

La ĝisnunaj venkoj de nia movado kaj precipe la gravaj servoj riceveblaj de la gazetara mondo postulas, ke ni ne prokrastu la restarigon de la *Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio*, kies agado stagnis ekde la morto de ĝia sindona sekretario, s-ro Adamsson. En la UK en Kopenhago okazos fakkunveno pri kiu informos ĝustatempe la kongresa oficiala programo. Ĵurnalistoj, ĉu aŭ ne ili partoprenos la Kongreson, estas insiste petataj afable ekrilati kun s-ro *Nørgaard Jepsen*, Redaktoro ĉe *Silkeborg Avis*, **SILKEBORG**, Danujo., por anonci sian ĉeeston ĉe la kopenhaga kunveno aŭ sian pretecon fariĝi membroj de tiu Asocio.

El la Mondliteratura Trezoro:

el „LA PILGRIMO DE CHILDE HAROLD” de BYRON

GEORGE GORDON NOEL, 6a LORD BYRON (1788-1824) estas poeto multe pli admirata en eksterlando ol en sia patrujo. Lia vigla, satira, rektesprima muzo ne multe akordiĝas kun la poezia gusto de multaj britoj. Tamen ĉiu devas konstati, ke li verkis plurajn el la plej belaj liriko de la angla literaturo, kaj unu el la ĉefaj eposoj: „DON JOHANO”. „LA PILGRIMO DE CHILDE HAROLD” estas longa poemo en kvar „kantoj”, kiu priskribas la spertojn de danda junulo en diversaj landoj de Eŭropo. Sube li priskribas hispanan taŭrbatalon.

La cirko plenas: ĉirkaŭ spaco preta
Apikaj miloj denseside aras;
Jam antaŭ la unua son' trumpeta
Neniu loko vakas. Jen pluralas
Sinjoroj, lordoj; kvankam pli normalas
Damoj lertegaj je okulpetolo,
Kiuj konsolojn tamen malavaras
Neniun mortigante pro ignoro,
Malgraŭ bardetaj plendoj, per sagoj de
amoro.

Ekmutol! Oraj spronoj la ĉevalojn
Blankkrestajn pikas; kun frapontaj
lancoj

Kvar kavaliroj votas bravajn farojn,
Klinante sin dum la preludavancoj
Kun riĉaj skarpaj kaj facilaj prancoj;
Se sorto tra l' danĝero ilin gvidos,
L'amasaklam', kaj inaj okuldancoj,
Kiuj plej bravajn farojn pli incitos,
Kompensos, kaj trezoroj de reĝoj
algravitos.

En luksa bril' sub pompo de mantelo,
Tamen piede, jen la Matadoro
Atleta staras preta por duelo
Kontraŭ la bovmonark' — sed post
kontrolo

De la teren' per zorga tretesploro
Por ke nenio lin embusimplikos.
La spad' protektos per disiga boro:
Nur tiel viro sen ĉeval' efikos —
Kiun, selinte ĝin, li tro ofte re-sangigos.

Trifoja klarion' signale vokas;
Taŭrkavo krevas, kaj senspira muto
Gapantajn murojn de la cirk' sufokas.
Spasme saltegas la giganta bruto
Draŝante la arenon ĝis ekŝuto
De l' sablo, ne sturmante blindacele,
Sed jen! minace dum batalpreludo
Finteman fruntan skuas, kaj kolere
Vostovipante rulas l' okulojn ruĝeŝvele.

Subite haltas li fiksarigarde;
For, fola bubol! lancon tenu preta,
Nun pereonte se repertuar' de
Lertoj ne spitos al atak' impeta.
Tramplas ĉevaloj je turniĝo neta;
La taŭro pluen saŭmas, sed skarlate
Sur lia flanko strias fluo streta:
Li fuĝas, sin tordante turmentate.
Surhajlas sagoj, lancoj, dum plendas
li muĝade.

Li retempestas spite lancojn, sagojn,
Kaj baraktadon de ĉeval' pikita;
Kaj vanigante virajn venĝoagojn,
Kontraŭ armiloj, forto, daŭras spita.
Unu ĉeval' sterniĝas mortrigida;
Alian ĝis pulsanta kor' dekolatas
Naŭze rivela ŝiro felddivida;
Mortonte li ankoraŭ feble fortas,
Kaj stumble sed defie la mastron
saveportas.

Senspira, sanga, sub provokatakoj
La taŭr' obstinas en la cirka centro
Inter la vundoj kaj incitaj sagoj
Kaj la viktimoj de la violento;
Kaj nun la Matadoroj per prezento
De l' flirta ruĝ', kaj glavolevo, pretas.
Ree tratondras lia turbulento:
Vana koler'! Mantelo trompe retas
L'okulon furiozan; finiĝo! li ekcedas.

Kie masiva nuko sur la spin'
Muntiĝas, la mortiga spado ingas.
Li tremas, haltas, strebas levi sin;
Je klama ekzaltiĝo grade sinkas:
Sen ĝem' aŭ lukto vivo sin estingas.
Kadavro al vulgara gap' levite
Sur festa ĉar' ankoraŭ sin distingas.
Ĝis kvar ĉevaloj vervas bridospite
Por ruli la tenebran bulegon pretervide.

el la angla trad.

John Francis



KRUCVORTENIGMO

8-10 — 3-4 — 15-7 — 5-14 — 11-1 — 5-8 — 9-5 — 11-10 — 12-12 — 13-4 — 6-6 — 14-13 parto de frakcio; 2-10 — 7-14 — 13-9 — 1-11 — 14-11 — 10-12 — 3-14 — 13-15 — 12-6 — 4-9 aparato en luebla aŭtomobilo; 1-7 — 14-2 — 5-4 — 1-1 — 8-15 — 7-5 — 2-13 — 4-6 — 7-9 — 9-12 — 6-12 — 15-2 pre-venta; 2-3 — 10-6 — 15-14 — 6-10 — 8-3 — 3-7 — 15-11 — 11-8 — 9-3 — 14-5 — 5-9 — 11-14 lernejo; 8-7 — 1-15 — 1-3 — 4-15 — 15-1 — 12-3 — 7-7 — 2-8 — 3-12 — 13-1 — 4-13 — 6-4 — 15-13 — 10-5 kreanto de belartaj konstruaĵoj 14-8 — 13-14 — 1-5 — 8-5 — 5-1 — 8-13 — 9-7 — 4-11 — 1-9 — 14-10 — 7-12 — 11-1 — 11-4 kvarlatera geometria figuro; 15-5 — 5-6 — 7-1 — 6-14 — 2-5 — 10-4 — 6-11 — 9-15 — 11-7 — 5-2 — 15-9 — 3-15 — 7-8 an-stataŭanto; 7-3 — 9-14 — 13-13 — 11-12 — 14-6 — 3-5 — 8-9 — 2-2 — 5-12 — 8-14 — 2-11 malsanulejo por kuraci diversajn malsanojn; 2-1 — 3-3 — 4-1 — 8-6 — 5-3 — 1-12 — 13-7 — 4-5 orkestra peco de opero; 4-4 — 3-8 — 5-7 — 14-7 — 4-12 — 9-1 — 2-15 — 9-9 — 13-8 portebla seĝo en orientaj landoj; 10-10 — 14-3 — 10-8 — 1-14 — 10-2 — 14-15 — 6-8 — 10-11 samrangulino; 8-8 — 15-8 — 5-15 — 8-10 — 1-8 — 15-3 — 12-11 — 9-11 — 13-3 — 4-7 ujo por enmeti lumigilon; 2-6 — 12-15 — 13-11 — 11-9 — 5-10 — 10-12 — 12-1 — 3-9 — 11-3 — 15-12 — 7-13 — 12-7 — 3-1 — 8-11 popolre-prezentantino; 7-15 — 14-9 — 7-11 — 1-4 — 15-15 — 12-5 — 12-4 — 2-14 — 7-2 erariga interplektaĵo da vojoj; 1-13 — 1-2 — 4-10 — 2-7 — 9-13 — 2-9 — 10-14 — 7-4 ornama skulptaĵo ĉe supra parto de kolono; 1-3 — 14-5 — 12-10 — 13-2 — 13-12 — 10-6 — 14-13 albumina substanco de lakto; 3-11 — 9-8 — 11-13 — 14-1 — 3-9 — 15-4 — 2-10 — 7-8 familianeto; 6-5 — 11-15 — 11-6 — 8-2 — 3-2 — 8-10 — 12-13 — 3-13 — 12-9 — 14-14 — 9-2 blekado de

rabobesto (tri vortoj); 6-2 — 4-3 — 13-5 — 11-2 — 5-13 — 8-1 — 9-9 — 9-4 granda rempieda marbirdo.

Ĉi-supre mi prezentas novan specon de krucvortenigmo. La figuro estas kvadrato de 15 x 15 kvadratetoj, en kiu la nigraj kvadratetoj formas tute simetrian figuron. En la ĉi-supraj klà-rigoj ĉiu fakto estas indikata per unu signo: ekz. 8 12, kio signifas ke oni metu la koncernan literon en la dek-duan fakon de la oka horizontala linio. La unua numero do ĉiam indikas la horizontalan linion, la dua numero ĉiam indikas la vertikalan kolonon. La nenomitaj kvadratetoj estas la nigraj. Oni faciligas al si la solvodon de la krucvorto, se oni unue klopodas trovi la nigrajn kvadratetojn, kiuj limigas la vortojn de la krucvorto.

Solvoj atingu min plej laste la 31an de julio 1956.

P. H. MOOY,

89, Av. du Sacré Coeur,
BRUSSEL - Jette,
Belgujo.

Esperantista Vivo

Naskigo

Zajko. La 19an de februaro ĉijare naskiĝis Miranda, dua filino de geedzoj Viktor kaj Bojana Zajko, Kronberg 120, Nova Gorica, Jugoslavio.

Geedziĝoj

Goninaz-Lecourtois. Michel Duc Goninaz, M.A. de UEA. kaj Arlette Lecourtois geedziĝis la 24an de marto 1956.

Kostinek-Field. Bohuslav Kostinek el Hradec-Kralove, Ĉeĥoslovakio edziĝis al F-ino Felicity Field el Burwood, N.S.W., Aŭstralio, en Kongregacia Eklezio en Burwood, la 14an de januaro 1956.

Nekrologo

Belinfante-Hoyer. La 4an de marto 1956 dronis s-ino C. J. Belinfante-Hoyer naĝante en la maro. Ŝi estis 42-jara. Dum jaroj ŝi estis MA de UEA, kaj Membro de sekcioj Amsterdam kaj Hago de LEEN, kaj dum kelka tempo helpis al s-ro Teo Jung, Redaktoro de „Heroldo”.

Bugajski. La 22an de marto, post longa malsano, mortis en aĝo de 53 jaroj s-ro Edward Bugajski, Prezidanto de Asocio de Esperantistoj en Pollando kaj membro de la Internacia Komitato de UEA. Dum pli ol dudek jaroj, ĝis la lastaj momentoj de sia vivo, li restis fidela al la granda ideo de la lingvo internacia. Li neniam, eĉ dum la malfavora por Esperanto tempo, perdis esperon pri venko de nia afero; sinofere li laboradis por ĝi kaj instigis la aliajn. Li ĉiam staris sur la posteno, malgraŭ sia ĉiam pli malboniĝanta sanstato. Lia frua morto estas terura bato por ĉiuj, kiuj kunlaboris kun li, kiuj ŝatis kaj amis lin, kaj por la Pollanda Asocio kaj la esperanta movado.

Hurley. F-ino Annie Hurley, ano de la Burnley'a grupo dum pli ol 40 jaroj, mortis la 5an de aprilo post longa malsano. Dum multaj jaroj ŝi estis tre aktiva en la movado, kaj dum 5 jaroj deĵoris kiel sekretario de la Lancashire kaj Cheshire Federacio (Britujo). Ŝi havis 75 jarojn.

Miklas. Wilhelm Miklas, iama Ŝtatprezidanto de Aŭstrujo, mortis la 20an de marto en sia 84a vivojaro. Tuj post sia elekto kiel Ŝtatprezidanto s-ro Miklas afable transprenis la Protektoraton de la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno kaj ĉiam restis afabla favoranto. Nia afero en Aŭstrujo perdis valoran apoganton.

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1956

Stato je la 30-a de aprilo

Konkurso I

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Hispanujo	1825	1740	94,75
2. Nederlando	5074	4819	94,34
3. Svislando	1740	1590	91,38
4. Britujo	7608	6825	89,73
5. Francujo	5869	5187	88,38
6. Finnlando	2872	2550	86,78
7. Belgujo	2135	1838	86,08
8. Svedujo	6893	5830	84,56
9. Italujo	3025	2540	81,96
10. Jugoslavio	2629	1840	69,98
11. Danlando	2765	1695	61,29
12. Norvegujo	2318	1315	56,72
13. Brazilo	6820	3660	53,66

Konkurso II

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Kanado	345	460	109,81
2. Islando	330	350	106,05
3. Portugalujo	495	485	97,97
4. Maroko	937	845	90,17
5. Urugvajo	330	295	89,39
6. Aŭstralio	1145	880	76,85
7. Izraelo	330	240	75,73
8. Japanujo	1182	885	74,87
9. Aŭstrujo	1485	890	59,92
10. Sudafriko	305	170	55,72
11. Meksikio	250	120	48,—
12. Nov-Zelando	854	405	47,42
13. Irlando	250	55	22,—



NOVAJ LIBROJ

Duope ricevitaĵn verkojn ni recenzas; unuope ricevitaĵn ni nur mencias.

*= ricevebla ĉe U.E.A.

eldono en 1918, por prezo nekredeble favora.

La nova eldono estas ago de pietato, ne nur al Mickiewicz, sed ankaŭ al la tradukinto Antoni Grabowski. En sia antaŭparolo Grabowski ja skribis:

„Mi intencis doni la verkon kun portreto de l' poeto kaj kun 24 ilustraĵoj de Andriolli. La nuna tempo, kiu multoble pligrandigis ĉe ni la eldonkostojn, tion jam ne permesis. Eble iam mi prosperos aperigi apartan albumon.”

Estas tre kare, ke la reeldonintoj, respektive je la deziro de nia mortinta poeto, enmetis, kun portreto pri Mickiewicz kaj akvaforto de Norwid, ankaŭ 10 tabulojn el la pentro-ilustroj de Andriolli.

Sinjoro Tadeo estas rakonto, kiu absorbas la leganton per sia movo kaj koloro, kaj kiu poste restas riĉa fonto de epika kaj poezia travivaĵo, kiun oni volonte kaj ofte refolios. Se mi pripensas, ke nur per Esperanto mi povas koniĝi kun tiu grandverko de la mondliteraturo — ĉar la ŝajne sola angla traduko estas farita per *prozaj paraĝoj* — mi sentas profundan dankon kaj fieran pri nia superba lingvo.

Estis mem Zamenhof kiu, serene supozante ĉe Grabowski tiun saman grandan kuraĝon, kiun li mem posedis, petis lin entrepreni la konsternan taskon. Grabowski rakontas:

„Vizitante la malsanan, neforgeseblan karan Majstron, mi... montris la tradukitajn fragmentojn, solajn kaj lastajn laŭ mia opinio. Tiam mi ricevis la respondon: „Traduku la tutajn”. Mi ekridis, ĉar al mi ŝajnis, ke la Majstro naive postulas neblaĵon. Sed doktoro Zamenhof ne ĉesis min emigi ĉe ĉiu mia nova vizito, ĝis mi fine subiĝis kaj komencis en Decembro de l' j. 1916 la tradukadon, kun malfido ke mi iam ĝin finos. Tamen komencinte, mi jam ne ĉesis. La Majstro, kiun mi konsultadis pri kelkaj novaj vortoj, formoj kaj esprim-manieroj, legis antaŭ sia morto preskaŭ la unuajn kvar librojn. Poste, malgraŭ mia malbona sanostato, mi daŭrigis la laboron, kiu postulis streĉon de ĉiuj miaj anim-fortoj,

por plenumi la lastan deziron de mia kara amiko, la granda kreinto de nia lingvo. Nun mi prezentas la verkon al la Esperantistaro en la konvinko, ke mi faris bonan servon al la patrujo kaj al nia tutmonda afero.”

Li aldonas:

„Ĉe la tradukado mi ofte devis admiri, kiel sonopentraĵas estas la vortoj de Esperanto. Tute fidela, preskaŭ laŭvorta traduko permesis konservi ankaŭ la poezian onomatopeon de l' originalo.”

Ludoviko Zamenhof, nepo de la Majstro, certigis min ke, se oni laŭlegas al iu ajn klera polo partaĵon el la Esperanta traduko, li tuj rekonas, ke tio estas el *Pan Tadeusz*, kvankam li eble ne komprenis eĉ unu vorton.

Mickiewicz, ekzilita en Parizo kaj neniam revidonta sian patrolandon, naskis el doloro kaj nostalgio sian ĉefverkon. Tamen la anima grandeco de la poeto kaŭzis, ke la persona ĉagreno neniom infektis la eposon. Male ĝi estas bonhumora, viva, plena de movo kaj suno, de la „pola ĉiutageco”, kiel diras la monografio. Eĉ pli malhela estis la vivo de Grabowski dum li tradukis la poemegon.

Kalocsay rakontas:

„Dum la milito li, kiel germana regato, devis forlasi Warszawa. Reveninte dum la germana okupacio, li trovis sian domon malplena: liaj familianoj formigris en Rusujon. Tiam, en la dezerta domo, li komencis kaj finis la tradukon de *Sinjoro Tadeo*, kiu laboro estis la sola konsolo, krom liaj oftaj kaj longaj vizitoj al Zamenhof. Post la morto de Z. li iĝis tre soleca, kaj pli kaj pli turmentis lin ankaŭ lia kormalsano, kiun li ne povis konvene kuracigi pro liaj premaj financaj cirkonstancoj. Kiam lia familio revenis, li jam estis preskaŭ elĉerpita korpe. Tamen, seninterrompe li laboris plu por Esperanto, ĝis sia subita morto (lin mortigis koratako antaŭ la montrofenestro de Esperanta librovendejo).”

La libro nun en niaj manoj elĉerpis do la spiriton kaj la sanon de du grandaj homoj: la aŭtoro kaj la tradukinto...

Adam Mickiewicz. Monografio de Mieczysław Jastrun. 80 p., 20,5 x 15 cm. kun kovrilbildo kaj 13 tutpaĝaj ilustraĵoj, broŝurita. Eldono laŭ komisiono de Komitato de Kulturaj Rilatoj kun Eksterlando. Eldonejo „Polonia”, Varsovio. Ŝajne ricevebla kontraŭ similvalora Esperanta libro.

Sinjoro Tadeo aŭ la lasta armita posedopreno en Litvo, vers-eposo en 12 libroj de Adam Mickiewicz, tradukis Antoni Grabowski. 336 paĝoj, 20,5 x 14,5 cm sur bonega papero, tuttole bindita kun ora surpriso, kun antaŭbildo kaj 11 tutpaĝaj ilustraĵoj sur kretpapero. Eldonejo „Polonia”, Varsovio. Prezo 1,5 dolaro.

Okaze de la centjaro de Mickiewicz (li mortis en 1855) la jubilea komitato en Varsovio eldonis interalie la du suprajn librojn. La unua skizas la evoluon de Mickiewicz, en kadro de la historio kaj la pola kultura renesanco, el romantika poeto kun originala potenco apliki la popollingvon, ĝis la ĉefmajstro, kiu kronis la tutan polan poezion per sia vasta vers-epopeo *Pan Tadeusz* (Sinjoro Tadeo). La dua libro redonas al ni tiun ĉefverkon ne nur de la pola sed ankaŭ de la Esperanta poezio, kiel plenumo de revo. *Sinjoro Tadeo*, kiel ankaŭ multaj aliaj pintoj de nia literaturo, longe mankis al ni. Nun ĝi reaperas en vesto pli ŝika kaj impona ol la unua

Malnovaj esperantistoj indulgu min se, por profito de la postmilita generacio de samideanoj mi citas ankoraŭ el la supra artikolo de Kalocsay en la *Enciklopedio de Esperanto*. Mia senkulpigo estas unue, ke mi peras utile el libro ne plu aĉetebla, kaj due, ke Kalocsay, kiu transprenis de Grabowski la mantelon de nia poezio, pli ol ĉiu povas apreci la meritojn de sia antaŭulo. Pri *Sinjoro Tadeo* li diras:

„Ĉi lasta estas unu el la plej grandaj fortostreĉoj de la E-a tradukarto, per ĝi G. fariĝas vere la patro de la E-a poezio. En ĉi tiu libro G. estas kuraĝa evoluiganto de la poezia lingvo E-a. Plue li rekonis, ke lingvo, kiu pretendas havi poezion, ne povas esti vortmalrica, do li ne timis la enkondukon de novaj vortoj. Lia vorto-trovemo estas plej ofte tre feliĉa... Ankaŭ cetere li estas kuraĝa tornisto de l' lingvo, kelkaj liaj trovaĵoj (ekz. *ĉi* anstataŭ *ĉi tiu*, senpera verbigo de substantivoj kaj adjektivoj, ablativa uzo de e-finaĵaj substantivoj ktp.) iĝis ĝenerale uzataj de la E-aj poetoj. Lia rimtrova preteco estas granda, li ofte uzas rimojn spritajn, majstras la versteknikon. Oni povus eble diri, ke li estas plie lingvo- kaj versartisto ol poeto, ke li ofte kontentiĝas je la forma solvo, lasante forgliti la pli intiman senton, ke lia lingvo-majstreco ofte majstras ankaŭ lin mem, kaj pro tio li kelkfoje laciĝas — sed eĉ la plej severa kritiko devas eksilenti antaŭ pluraj partoj de *Sinjoro Tadeo* (la *Tempesto*, la *Ĉaso*, la *Koncerto de Jankjel*, la *Litva Praarbaro* ktp.) kiuj ĉiam apartenos al la plej belaj paĝoj de nia tradukpoezio.”

Entute ĉi tiu eldon-evento redonas al ni ĉefan ĉeneron de nia kulturo. Iam mi legis opinion de Prof. Waringhien, ke *S-ro Tadeo* devus esti nepra legaĵo en iu supera kurso. Estas ja necese, ke la lernantoj de nia lingvo plonĝu frue en la vivofluon de nia literaturo, el respekto kaj aspiremo, kiel oni volonte faras, kiam oni iom studis fremdan nacian lingvon. Sekvus nur jena diferenco, ke la Esperanta beletra verko, kiun oni aĉetas, verŝajne estos legata, dum la nacilingva tre eble restos parada ornamo sur la librobreto (oni almenaŭ montras sian fideman estimon je la nekomprenata literaturaĵo!). Nu, en plej simpla okazo ankaŭ la Esperantaj verkoj povas esti ornamoj, kaj ofte, kiel ĉe *Sinjoro Tadeo*, ornamoj loge malmultekostaj.

Estintus utile listigi la vortojn netroveblajn en la 4-a eldono de Plena Vortaro. Sed efektive diversaj vortoj estas klarigitaj en subnotoj kaj la ceteraj sidas en tiel viva kunteksto, ke oni tuj komprenas aŭ facile divenas ilian signifon.

La redaktintoj de la nova eldono kelkloke forigis streketon en la vortoj kaj ŝanĝe minusklis monatonomojn. Tio estas nur bagateleto; ĝi tamen ŝajnas al mi ne motivita. *S-ro Tadeo* estas klasika verko de nia literaturo kaj mia opinio oni devus respekti ĉiun grajnon de la originalo.

Reto Rosetti

NIA FORUMO

Pri „Esperanto”

Bonvolu akcepti gratulon pro bona redakto de „Esperanto”. Nova spirito kaj nova talento estas okulfrapaj. Tradicio estas bona afero, sed kuraĝo eksperimenti pli bona. Ankaŭ tipografia aranĝo estas tre plaĉa.

Kamaryt.

Antaŭ semajno mi ricevis la januaran numeron de la Revuo, kaj tre ĉagreniĝis, trovinte, ke la formato estas ŝanĝita. Vi certe faris paŝon malantaŭen!

H. R. Dreyer.

Nur por esprimi mian kontenton kaj ĝojon pro la nova formo de la gazeto, kaj la pli ol 20,000 anoj. Dankon al vi pro la beleco de la gazeto.

Conrad Fisher.

Kun plezuro mi ĉiam legas nian revuon „Esperanto”; sed permesu al mi iomete kritiki ĝian novan veston, ĉar fakte mi estis tre seniluziita, vidinte la novan aspekton de la revuo. La prezidanto de UEA diris en sia novjar-saluto, ke „Esperanto” ricevis novan kaj pli plaĉan aspekton, sed mia opinio ĝi ricevis aspekton nur novan, sed ne pli plaĉan.

Eskil Svane.

...kies enhavo sub via gvidado iĝis pli interesa kaj pli vivanta.

Erik Carlen.

Kun kontento kaj ĝojo la esperantistaro certe akceptis la novformatan revuon „Esperanto”, kiu pli bone servas bezonojn de la movado. Precipe propagande inter ne-esperantista publiko kaj ĉe gravaj instancoj la nova formato pli imponas ol la antaŭa. Ankaŭ tipografie kaj grafike la nuna formato multe utilas.

Sed la jarlibro de UEA — ĉu ĝia formato estas konvena? Por la poŝo ĝi eble komfortas, sed kiom multaj esperantistoj ĝin kunportas en sia poŝo eĉ dum vojaĝoj. Sur la breto de la libraro ĝi aspektas tute bagatela apud pli altformaj verkoj havantaj ĝenerale alton de 21 cm. Do, ĉar nuna estraro de UEA dankinde aktivigas kaj novaj freŝaj ventoj ĉe ili blovas, bonvolu reformi ankaŭ la jarlibron. Samfoje pripensu, ĉu efektive gravas duvoluma jarlibro. Ŝajnas, ke la esperantistaron kontentigus poŝare unu sola volumo. Je la kostoj de du „bagatelaĵoj” la unuvoluma jarlibro en sia novformato ja povus fariĝi pli ampleksa, pli impona kaj eĉ pli informa. Tia verko ĉie en esperantistaj hejmoj estus konstante videbla bonega propagandilo. Se vi donos al ni tian reformitan jarlibron ni aplaŭdos kaj dankados vin.

Vilho Salonen.

Esperanto kaj infanoj

La artikolo de Ib Schleicher (*Esperanto* 49/3, p. 42—43) pri la „ankaŭ-esperanta edukado” de la infanoj tenis mian atenton.

Kvankam miaj personaj spertoj iom malsamas, mi nepre aprobas la ĝeneralajn ideojn de la aŭtoro. Estas nepre granda avantaĝo eduki la infanojn — ne nur en la kutima nacia lingvo — sed ankaŭ en la internacia. La plej simpla maniero evidente estas kiam oni decidis apliki Esperanton en la familia vivo, jam antaŭ demando pri naskiĝo. Sed ĉio dependas de la cirkonstancoj.

Apliki la lingvon en la familio estas nur aparta kazo de la principo, laŭ kiu inter esperantistoj oni parolu esperante. (Kaj ĉu vi pretendas persvadi la mondon, se antaŭe vi ne jam kapablis konvinki kaj esperantigi vian vivkunulon?)

Aliparte mi estas profunde konvinkita ke enfamilia apliko de Esperanto, ĝenerale kaj konsiderinde levus la nivelon de lingvokono. Oni almenaŭ ne plu vidus t.n. „ eminentulojn ” kiuj laciĝas post kelkhora uzo de Esperanto (en kongreso ekz.) kaj kiuj estas kontentaj daŭrigi en la nacia, precipe se temas pri teknika afero. La enfamilia uzanto principe estas la centprocenta konanto de la lingvo; tio estas precipe vera, se li aŭ ŝi edukas infanojn, ĉar tiuj karaj homidoj estas tre postulemaj kaj deziras ĉion scii...

Mi same estas profunde konvinkita, ke se niaj verkistoj aplikus — kaj kelkaj aplikas — la enfamilian uzon, nia literaturo farus atentinde gravan paŝon antaŭen. La lingvo — se iel eble — estus ankoraŭ pli flua kaj viva, eĉ ĉe niaj plej grandaj aŭtoroj. Anstataŭ vesti nacilingvajn pensojn per Esperanto ili uzus iom pli vivan ĉiutagan lingvaĵon, pli realan, pli nuancitan, pli koloritan.

Pli profunde — ĉar pli konstante — ensorbinte la sukcon kaj spiriton de la lingvo, ili verkus en pli pura kaj pli potenca lingvo.

Tiel, ankaŭ nia literaturo — tra la familioj de siaj verkistoj — intimus kun la popolo. Ĉu tio, cetere, ne estas unu el la konsiloj de la grandaj nacilingvaj verkistoj?

Sed kompreneble, nur kiuj sufiĉe fidus Esperanton, nur tiuj apliku „enfamilian uzon” kaj „ankaŭ-esperante” eduku.

D-ro A. Albault.

Se mi estus birdo . . .

mi flugus al vi por danki, ke vi sendis la kanton al „Esperanto”. Ĝi tre plaĉas al mi. Mi proponas, ke „Esperanto” reproduktu pli ofte tiujn kantojn, precipe popolkantojn el kiel eble plej multaj landoj. Estus bele, se oni donus kelkajn klarigojn pri komponisto, ktp. Eble ankaŭ dua aŭ eĉ tria partio estu komponita. Plue, oni metu la vortojn de la unua strofo sub la notojn, por ke oni povu dispartigi la vortojn ĝuste al la notoj. Kial ne ankaŭ la originalan tekston?

Hermann Korell.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM C. NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO

La 1-an de majo 1956

N-ro 283

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de aprilo kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de aprilo 1955:

	1955	1956
Asociaj membroj	3155	7288
Individuaj membroj		
MJ	733	716
MA	3557	3722
MS	729	657
Pat.	8	9
DM	287	290
HM	57	54
	<u>5371</u>	<u>5448</u>
	<u>8526</u>	<u>12736</u>

DELEGITOJ:

Argentino

Venado Tuerto (Santa). D: S-ro Eduardo Creus, Farmaciisto, Calle San Martin Nro. 200.

Aŭstralio

Bathurst (New South Wales). D: Vakas
Hobart (Tasmanio). D: Vakas.

Brazilo

Santos (S. Paulo) FD (Pafo al la cel-tabulo): S-ro Tito de Barros Jr., Farmaciisto, Av. Dr. Epitacio Pessoa nr. 26

Bulgario

Sofia 8. FD (Kristanismo): Dro Atanas D. Atanasov-Agro, Agronomo, Strato Corlu nr. 7

Danlando

Falling (Jutlando). D: vakas.

Finnlando

Helsinki (Oulunkylä). VD: S-ino Heljä Faven, studentino, Mikkolantie 5.

Francujo

Nancy (Meurthe & Moselle). FD (Abelbredado): S-ro Louis Collin, emerita-P.T.T.-Inspektoro, Rue Augustin Hacquard 39.

FD (P.T.T.): vakas.

Germanujo

Frankfurt a.M. (Hessen). D: S-ro Wilhelm Kistenbrügger, Bankoficisto, Rohlederstrasse 10.

Hannover (Niedersachsen). FD (Instruado): S-ro Heinrich Müller, instruisto, Mommsenstrasse 51.

Lehrte (Niedersachsen). D: vakas.

FD (Instruado): vakas.

Hispanujo

Barcelona. FD (Denttekniko): vakas.

Hungario

Nagykörös. FD (Aŭtomobila Elektrisimo): S-ro Jozsef Biczò, Elektrometiisto, Rákoczi u. 33.

Iran

Abadan (Fuzistan). D: S-ro Ali Saĝadian, Teknika Oficisto de petrola finejo, Palmgrove 831/3.

Izraelo

Neve Hadasa. FD (Vivreformo): S-ro Martin Maschler, Ĝardenisto, T.D. 1859, Tel Aviv.

Nederlando

Krommenie (Noord-Holland). D: vakas.

Pollando

Bielawa (Dolny Slask). D: Inĝ. Romuald Pacholec, Inĝeniero, ul. Swierczewskiego 4/3.

Bielsko-Biała. (Woj. Stalinogrodzkie); D: S-ro Mieczystaw Dydak, Juristo kaj Ekonomisto, ul. Zywiecka 47 m 8.

Chorzów (Woj. Stalinogród). D: S-ro Wilhelm Kloska, Ŝtatoficisto, ulica Trucana 19 m 10.

Cieszyn (Wojew Stalinogrodzkie). D: S-ro Zdzisław Glajcar, mgr. inĝ. de arbarismo-agrikulturo, Skrytka Poczta 3.

Czestochowa. D: S-ro Tomasz Wójcik, Studento, str. Lukasinskiego 79.

Dziegielów (pow. cieszyński). D: S-ro Jan Tichawski, Ekstervojisto, Dziegielów 109.

Gdynia (Wybrzeze). D: S-ro Czesław Wolczyk, Fotografisto, str. Rotterdamska 9/12.

Glucholazy (Opole). D: S-ro Jan Reznier, Oficisto, ul. Powstancow Slaskich 2. 3p.

Kraków. D: S-ro Stefan Dziwlik, Oficisto/inĝeniero de sekureco kaj higieno de laboro, Al. Slowackiego 43/5.

Łódź. D: S-ro Adolf Capf, ekonomiisto, Sienkiewicza - strato 42.

Lublin. D: S-ro Józef Konderak, arbaristo. Str. 1 maja 6 m. 8.

Mragowo (Mazury). D: S-ro Ĉeslav Gostomski, Pastro (luterana) ulica 8-go Maja nr. 15.

Oswiecim-Osiedle. (Krakovia): D: S-ro Fryderyk Slatynski, Elektristo, str. Smoluchowskiego 6/3.

Przemysl (Rzeszow). D: S-ro Wilhelm Sochatynski, Oficisto, ul. Jagiellonska 12.

Radom. D: S-ro Władysław Misiewicz, Librovendisto, Guardü Ludowej 12/23.

Tarnów. D: S-ro Stanisław Dmochowski, Poŝtoficisto, Str. Sowinskiego 20/1.

Wrzesnia (Woj. poznański): D: S-ro Władysław Monarszynski, Instruisto, ul. Kosynierów 54.

Svedujo

Skellefteå (Västerbotten). D: S-ro Edvard Björkstrand, Teledirektoro, Vallgatan 10 B.

Usono

Milwaukee (Wisconsin). D: S-ro Jarvis E. Bush, Instruisto, 3700 North 75th Street, Milwaukee 16.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1956:

529. Larsson, F-ino Essy, Boden, Svedujo.
530. Fingalsson, S-ro Harald, Gisebo, Svedujo.
531. Lind, F-ino Estrid, Stockholm, Svedujo.
532. Lindberg, S-ro Torsten, Prässebo, Svedujo.
533. Ljungberg, S-ino Astrid, Stockholm, Svedujo.
534. Malmgren, S-ro E., Stockholm, Svedujo.
535. Olsson, S-ro Eduard, Badabruk, Svedujo.
536. Ostman, S-ro Ossian, Husum, Svedujo.
537. Persson, S-ro Olle, Trelleborg, Svedujo.
538. Sjöblom, S-ro Tore, Stockholm, Svedujo.
539. Söderberg, S-ro K., Upsala, Svedujo.
540. Syrjämäki, S-ro Matti, Kumla, Svedujo.
541. Westerlund, S-ro Owe, Karlholmsbrück, Svedujo.
542. Giannini, S-ro Walter, Zollikerberg, Svislando.
543. Berger, S-ro B., Montevideo, Urugvajo.
544. Tato, S-ro Helios, Montevideo, Urugvajo.
545. Ayres, S-ro Cl. N., Saugus, Usono.
546. Belinfante, D-ro F. J., West Lafayette, Usono.
547. Doneis, S-ro A. F., Pharr, Texas, Usono.
548. Ekstrom, S-ro Erik, Inglewood, Usono.
549. Klimas, S-ro Adolfas, Cleveland, Usono.
550. Lewine, S-ro John L., New York, Usono.
551. Lippmann, S-ino Elise C., Brooklyn, Usono.
552. Lomo, S-ro Alfonso, Glen Oaks, Usono.
553. Mitschke, S-ro Fritz, St. Petersburg, Usono.
554. Simon, S-ro Werner, Memphis, Usono.
555. Simpson, S-ro W. P., Harrisburg, Usono.
556. Vidack, S-ro J., Wash, Usono.

557. Fabjan, S-ino Erna, Vorarlberg, Aŭstrujo.
 558. Meister, D-ro Oskar, Graz, Aŭstrujo.
 559. Boffejon, S-ro Hector, Antverpeno, Belgujo.
 560. Radermecker, S-ro J., Bruxelles, Belgujo.
 561. Albuquerque, D-ro José J. de, Meceio, Brazilo.
 562. Araujo, S-ro B. Colect de, Rio de Janeiro, Brazilo.
 563. Araujo, S-ro G. Soares de, Rio de Janeiro, Brazilo.
 564. Assis, S-ro Franklin, Palmeira das Missões, Brazilo.
 565. Burger, S-ro Petronio R., Lajes, Brazilo.
 566. Câmara, Miguel de Arruda, Rio de Janeiro, Brazilo.
 567. Cesco, S-ro Elyseu, Campo Grande, Brazilo.
 568. Coelho, S-ino Ambrosina Jor., Belo Horizonte, Brazilo.
 569. Costa, D-ro José Maria, Barra Mansa, Brazilo.
 570. Cruz, S-ro Carmenio, Juiz de Fora, Brazilo.
 571. Dionisio, S-ro Carlos H., São Leopoldo, Brazilo.
 572. Dutra, S-ro O. Derby, Juiz de Fora, Brazilo.
 573. Labbate, S-ro J., Caratinga, Brazilo.
 574. Ludka, S-ro P. de Oliveira, Niteroi, Brazilo.
 575. Maciel, S-ro J. Couto, Salvador, Brazilo.
 576. Martins, D-ro Miguel José, Juiz de Fora, Brazilo.
 577. Melo, S-ro J. Olivio, Rio de Janeiro, Brazilo.
 578. Moreira, D-ro Augusto Pinheiro, Belo Horizonte, Brazilo.
 579. Moreira, S-ro José, Rio de Janeiro, Brazilo.
 580. Pauluk, S-ro José, Irati, Brazilo.
 581. Peixoto, S-ro O., Niteroi, Brazilo.
 582. Rocha, S-ro Pedro Nunes, Sao Paulo, Brazilo.
 583. Rodrigues, S-ro O., Rio Pomba, Brazilo.
 584. Rosa, S-ro N. Della, Americana, Brazilo.
 585. Sant'ana, Kap. Jorge, Firmino de, Juiz de Fora, Brazilo.
 586. Santos, Prof. Manuel Joaquim dos, Rio de Janeiro, Brazilo.
 587. Severo, S-ro João Correa, Bagé, Brazilo.
 588. Siedlecki, S-ro Kazimiro, Matinhos, Brazilo.
 589. Silva, S-ro Leonidas, Bauru, Brazilo.
 590. Silveira, S-ro I. da, Filho, Juiz de Fora, Brazilo.
 591. Simao, S-ino Aurea, Belo Horizonte, Brazilo.
 592. Verde, D-ro D. Lima, Limoeiro do Norte, Brazilo.
 593. Vitale, S-ro Moacyr, Salto, Brazilo.
 594. Wehrs, F-ino E., Niteroi, Brazilo.
 595. Xavier, Gen. Mário, Juiz de Fora, Brazilo.
 596. Zamora, S-ro Ary, Porto Alegre, Brazilo.

597. Cronin, F-ino A. L., Andover, Britujo.
 598. Denton, S-ino M. T. D., London, Britujo.
 599. Francis, S-ro R., Gravesend, Britujo.
 600. Fraser, F-ino R. G. M., Ilford, Britujo.
 601. Ison, F-ino H. M., Ardleigh, Britujo.
 602. Kennedy, S-ro F., Angmering-on-Sea, Britujo.
 603. Knight, S-ro Frank E., Dorchester, Britujo.
 604. Morton, F-ino H. R., London, Britujo.
 605. Ranwell, S-ro B., Enfield, Britujo.
 606. Relf, S-ro E. F., Spinney Hill, Britujo.
 607. Rossetti, S-ro R., Birmingham, Britujo.
 608. Ryan, S-ino Jane S., Manchester, Britujo.
 609. Sinclair, F-ino P. C., Buckhaven, Britujo.
 610. Wilson, S-ro H. A., Dagenham, Britujo.
 611. Nielsen, S-ro Benny, København, Danlando.

DONACOJ AL LA ĜENERALA KASO:

E. Carlén, 31,55 gld.; E. Mila 5,40 gld.

DONACOJ AL LA FONDAJO-MONTEVIDEO:

G. Jocham: 2,71 gld.

DONACOJ AL LA FONDAJO-EKSPozicio:

O. Sandrock: 9,05 gld.; L. Minnaja: 6,08 gld.; Esp. Grupo Mantova: 3,04 gld.; J. Derieuw: 3,80 gld.; W. Reich: 33,07 gld.; E.B.E. 14,69 gld.; Esp. Klubo Bergen: 22,- gld.;

Al ĉiuj donacintoj nian plej koran dankon.

TESTAMENTAJO

Nia profunde bedaŭrata membro S-ro Charles Harold Briggs, loĝinta en Usono, kiu forpasis antaŭ nelonge, testamentis al UEA la sumon de \$ 100. Ni alte taksas tiun geston de ŝatata samideano, kies fideleco ne ĉesis kun la morto. La sumo estos uzita en la spirito en kiu ĝi estis donita por la bono kaj prospero de la Internacia Lingvo.

KOMITATANOJ B

Delegitoj, kiuj ankoraŭ ne resendis la voĉdonilon por komitatanoj B, bonvolu TUJ fari tion. Atentu ke la limdato estas la 10-a de Junio venonta.

JANUARA NUMERO

Kiel anoncote pli frue, ni grandskale

RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Mallongigoj: I = Informoj, P = Parolado, K = Kurso.

Dimanĉo	14.00-14.15	Piraĉununga, 198m. K. Rádio-Difusora ZYI 3, Piraĉununga (São Paulo), Brazilo.
	23.00-23.30	Bilbao. 265m. P. Radio Bilbao, Hispanujo.
Lundo	12.30-1300	La Coruña. 250m P.K. Radio Juventud, Real 71, La Coruña, Hispanujo.
	22.40-22.57	Hilversum, 402 m. P. N.C.R.V., Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando (nur la unuan lundon de ĉiu monato).
Mardo	00.45-01.00	San José. 192m P. Radio Welcome CW47A, San José, Urugvajo.
	11.55-12.00	Bern. 48.66m, 31.46m, 13.94m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse, 23, Bern, Svislando.
	15.00-15.10	Ljubljana. 327m, K. Radio Ljubljana, Jugoslavujo.
	17.35-17.40	Bern. 48.66m, 31.46m, 13.94m, P. D-ro Baur.
	19.00-19.15	Stockholm, 42m, 20.10m. P. Radio I.B.R.A., Esperanto Poŝtfako 822, Stockholm 1, Svedujo (nur la lastan mardon de ĉiu monato).
	19.15-19.30	Carlet. 288m. I. Radio Carlet (Valencia), Hispanujo.
Merkredo	15.30-15.40	Wien. 203m., 48m., 41m., 30m., 25m. P.
	16.00-16.10	Caramulo. 205m. I. Rádio Polo Norte, Caramulo, Portugalujo.
	17.55-18.10	Roma. 41.24 m, 30.90 m, 25.40 m. P. S-ro Minnaja. Radio Roma, Casella postale 320, Roma, Italujo.
	21.55-22.05	Wien. 208m, 48.74m, 25.46m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
	22.15-22.20	Hilversum, 298m, 188m, I. V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
Ĵaŭdo	06.45-06.50	Perpignan. 202m. K. Radio Perpignan-Roussillon, Perpignan (Pyr. Or), Francujo.
	08.30-08.45	Paris. 348m, 249m. K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.
	11.55-12.00	Bern. Kiel marde P. D-ro Privat.

dissendis tiun numeron de la revuo kaj petis niajn ĉefdelegitojn kaj perantojn propagandi per ĝi. Se nun restis ĉe ili ekzempleroj, kiujn ili ne plu uzos, ni afable petas resendi ilin al nia oficejo, Eendrachtsweg 7, Rotterdam.

BINDITAJ JARKOLEKTOJ 1955

Post longa atendado ni fine ricevis ilin de la bindejo kaj ni tuj plenumis ĉiujn antaŭmendojn. Tiuj, kiuj deziras ricevi ĝin, ne prokrastu mendi ĝin.

FLUGFOLIOJ SESLINGVAJ

Venas la sezono de sennombraj kongresoj ĉie en la mondo. Zorgu, ke la partoprenantoj de tiaj kongresoj en via loko ricevu la flugfolion, ĉar ĝuste en tiu momento ili spertas la lingvajn malfacilaĵojn kaj tradukajn ĝenojn. Vidu artikolon en februara numero paĝo 17.

M. H. Vermaas,
Administranto.

ANONCETOJ

4 fraŭlinoj, dumvoje al Kopenhago, deziras pasigi kelkajn tagojn en bela regiono en Germanujo aŭ sur unu el la danaj insuloj en la semajno antaŭ la kongreso. Kiu povos doni konsilon? Detalajn sciigojn (kun hotelprezoj) sendu al: F-ino Aaf Tebbenhof, Abel Tasmanplein 2, Groningen, Nederlando.

Adressânĝo R. Rossetti. 26 Priory Road, Birmingham 5, Anglujo.

Koresponda Servo Mondskala havigas korespondantojn el pli ol 30 landoj laŭdezire. Skribu, indikante vian aĝon kaj aldonante respondkuponon, al: Daniel LUEZ, Boulevard Brossolette, LAON (Aisne), Francujo. Naciaj Esperantogazetoj bonvolu afable represi tiun anonceton.

La Nova Kristaneco, bazita je la doktrino de sveda sciencisto kaj reformanto Em. Swedenborg, enportas certan lumon en la homan animon pri la postmorta vivo kaj pri vera religio bazita je la Biblio kaj ĝia interna senco. Ĝi akordigas la religion kun la scienco. Postulu traktatojn senpage. Aldonu, se eble, resp. kuponon. Adresu: Jan B. Vlach, Luzjická 21, Praha XII, Ĉeĥoslovakio.

„**Esperantista semajno**” en mediteranea regiono, sub tendo, de 14a ĝis 20a julio. Informos vin Lentaigne, Balaruc-les-Bains, Hérault, Francujo.

Soveta esperantisto deziras renovigi korespondadon kun ĉiuj amikoj el periodo 1926-36. G. M. Dehterev, ulica Volodarskogo 45-A, OMUTNINSK, Kirovskoj oblasti, USSR.

Dezirus interŝanĝi diversajn amerikajn kaj francajn librojn kontraŭ hispanaj kaj italaj. S-ro T. Kubiak, 101 Mayfair Avenue, Winnipeg 13, Man, Kanado.

Asocio de Esperantistoj en Pollando-Filio en Opole-serĉas korespondantojn por siaj geanoj. Skribu multnombro indikante vian aĝon, sekson, dezirojn kaj ni kontaktigos vin kun iu el nia grupo! Adresu: Asocio de Esperantistoj en Pollando-Filio en Opole- OPOLE, 1 Maja 6 a.

Hispana samideano deziras korespondi kun francparolantaj geesperantistoj por bone lerni francan lingvon. Ramón Molera, Str. Hospital 13, MOYA (Barcelona), Hispanio.

Ni deziras kontakton kun partoprenantoj geesperantistoj al la XVII Internacia Skolta Renkontiĝo kiu okazos en Barcelona venontan someron. Se ĉeestus multaj gesamideanoj ni povus aranĝi Esperantan Kunvenon. Skribu al Esperanto Grupo Moya, Str. Forn 19, MOYA (Barcelona), Hispanujo.

Interŝanĝas poŝtmarkojn kaj poŝtkartojn Eyolf Berntsen, Østerliveien 62 B, Lambertseter, Norvegujo.

Infandesegnaĵojn kaj pentraĵojn por ekspozicio de Esperanto. Aĝo 6-14 jaraj. Oni ne permesis la instruadon de Esperanto en nia lernejo. Bonvolu sendi materialon por dokumenti. Ekspozicio en julio-aŭgusto. Vágó Imre instruisto Pécs, Rudas-utca 21, Hungarlando.

12 geliceanoj — 13-18 jaraj — deziras kontakti kun samaĝuloj kiuj vizitos 41-an en Kopenhago (eventuale ankaŭ en Büsum). Ni ekveturos 26/7. Yhteiskoulu, SOMERO, Finnlando.

Letervespero. Skolta Esp. Ligo dana sekcio aranĝos letervesperon dum la tendaro ĉe Kopenhago 28/7 — 3/8 (en rilato al la 41-a U.E.A. Kongreso).

Bonvolu sendi leterojn, broŝurojn, insignojn k.t.p. al la agento S-ro Sejer Holgersen, Ejnarsvej 99, Lyngby, Danlando. Respondon promesas.

32-jara pola esperantisto deziras tutmonde, tre vigle korespondi kun gesamideanoj, (ĉefe el tropikaj landoj), pri diversaj temoj. Respondo certa. Stanislaw Kwzyzanowski, ul Kolejowa n-ro 25 Jedlnia k/Radomia, Pollando.

Ĉu vi serĉas Esp-libron? Eble mi havas aŭ havos. Stampu aŭ surgluu ĉiam Esp. propagandilon sur viajn korespondaĵojn, por ke oni vidu, ke Esp. estas uzata. Libro-vendisto, H. Veenstra, J. M. Kemperstraat 28, Amsterdam, Nederlando.

Ok fervoraj oficistinoj kaj mekanistoj, anoj de Esperanto Rondo de unu el plej grandaj fabrikoj de Pollando, deziras korespondi per bildkartoj, leteroj aŭ interŝanĝi revuojn ktp. Certe respondos. Skribu al grupestrino Donata I. Malinowska, ul. Holenderska 34, Wroclaw 25, Pollando.

20 gelernantoj, 15-60 jaraj, ĵus finintaj E-kurson, deziras korespondi kun la tuta mondo. Bonvolu skribi al: S-ro P. Guillot, professeur, Cours 4-° République, Gaillard, (Hte-Savoie), Francujo.

Izolulo, inĝ. W. Stockhausen, Lohr, Germanujo, Rodenbacherstr. 17 intencas varbi per ekspozicio kaj petas amase ĉiuspecajn Esperantaĵojn ankaŭ de malproksimaj landoj.

	17.35-17.40	Bern. Kiel marde P. D-ro Privat.
	22.30-23.00	Valencia. 200m. I.K. Radio Alerta, Colón 11, Valencia, Hispanujo.
	22.45-23.00	Zagreb. 264m. I. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
	23.30-24.00	São Paulo, 62.83m. I.K. Rádio Progresso. São Paulo, Brazilo.
Vendredo	00.45-01.00	San José. Kiel marde.
	17.55-18.10	Roma. Kiel merkrede. P. D-ro Musella.
	19.15-19.30	Carlet. Kiel marde.
	21.30-21.45	Guatemala Cd. 370m, 197m, 47m, 30.50m. I. Radio-Esperanto, La Voz de Guatemala. Mez-Ameriko.
Sabato	11.15-11.30	Rio de Janeiro. 214m. K. Rádio Roquete Pinto PRD5, Rio de Janeiro (D.F.), Brazilo.
	17.30-18.00	Rio de Janeiro. 375m, 30.70m, 25.10m, 16.80m. K.I. Rádio Ministério da Educação, Praça da República 141A, Rio de Janeiro (D.F.), Brazilo.
	18.45-19.00	Barcelona. 360m. I.K. Radio Unión, Emisora del Frente de Juventudes, Barcelona, Hispanujo.
	22.15-22.22	Hilversum. 402m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.


Radio Roma:

1.IV. Itala muzikisto Ottorino Respighi; 6.VI. Mondo Esperantista; 8.VI. Leterkesto kaj bibliografio; 13.VI. Novaĵoj el Italujo; 15.VI. Opinio de blindulo pri la grefto de la korneo; 20.VI. Nia gazeto; 22.VI. Kie ni povas somerrestadi en Italujo; 27.VI. La lagoj de Romo; 29.VI. Italujo kaj la fremdaj muzikistoj: R. Wagner.

Alvoko al aŭskultantoj.

De mallonga tempo landoj de centra kaj orienta Eŭropo ekmalfermiĝis al internacia turismo. Pro tiu evoluado radiostacioj de kelkaj el ĉi-tiuj landoj montris intereson por Esperanto kaj afable respondis al leteroj de aŭskultantoj, kiuj demandis pri nia lingvo. Estus utile, por helpi la klopodojn de la lokaj samideanoj, ke leteroj el eksterlando petante pri Esperantlingvaj dissendoj alfluu ne nur al la stacioj, kiuj jam havis tiajn programojn antaŭ kelkaj jaroj, sed ankaŭ al la aliaj. Tiaj koncizaj adresoj sufiĉas:

Radio Praha, Ĉeĥoslovakujo; Radio Budapeŝt, Hungarujo; Radio Moskva, U.S.S.R.; Radio Sofia, Bulgarujo; Radio Warszawa, Polujo; Radio București, Rumanujo.



Por la kvina fojo okazos de 28.7 — 3.8.1956
**INTERNACIA FERIO-SEMAJNO
 EN KONSTANZ**

al kiu ni vin elkore invitas.

Rektmetoda perfektiga Esperanto-kurso, elektitaj kulturaj aranĝoj kaj turismaj programoj atendas vin.

Petu informojn ĉe: IFS Esperanto, KONSTANZ, Grüngang 8, Germanujo.

Ĵus aperis en Pollando nova lukso eldono je eksterordinare malalta prezo de la fama ĉefverko de la glora pola poeto

Adam Mickiewicz:

SINJORO TADEO

aŭ

la lasta armita posedopreno en Litvo
 Nobelara historio de la jaroj 1811 kaj 1812 en dekdu libroj verse

Tradukita de ANTONI GRABOWSKI
 Eldonejo „Polonia” Varsovio, 1955.

Lukso eldono kun ilustraĵoj de David d'Angers, C. K. Norwid kaj E. M. Andriolli. Tola bindo kun ora stampo kaj titolpaĝo laŭ projekto de Andrzej Heidrich. XII + 333 paĝoj. Formato 15 x 21 cm.
 Prezo nur 6.- n.gld., 24 steloj.

MENDU ĉe U.E.A.

**PARADIZAJ
 FERIOJ**

en GRANDA PARADIZO!

ITALAJ ALPOJ
 29 JULIO - 19 AŬGUSTO

Turismoficejo de I.E.F.
 Via S. Antonio da Padova 4
 Torino - Italujo

GRAMOFONA DISKO
**BOLOGNA 1955
 SALUTPAROLADOJ**

Interesa dokumento
 Grava propagandilo
 Speco de disko: 45 r.p.m.
 Prezo 5 guld.

Mendu ĉe UEA,
 Eendrachtsweg 7
 Rotterdam-C., Nederlando

INTERESAJ FERIOJ ĉe
Kastelo GRESILLON

Kulturdomo de francaj
 esperantistoj

Restado de la 1-a de Julio ĝis
 Septembro

La Prezidanto de la Kulturdomo
 Petu informojn de

Kastelo Grésillon
 BAUGÉ (M. et L.) Francujo

**la nica
 literatura
 revuo**

sub ĉefredaktoreco de
Prof. G. Waringhien
 kun kunlaborado de
 la plej famaj verkistoj
 aperas ĉiun duan monaton
 32/40 paĝa - - poŝformata
 jare fr. fr. 400.- aŭ egalvaloro

Ricevas la abonojn:
 En Francujo: R. Fiquet, Poŝta
 konto 2259-98 Marseille

Alilande: Ĉiuj Ĉefdelegitoj kaj lan-
 daj Perantoj de UEA

Redakcio: Administracio:
 7, Av. Léon-Gourdault 5, Bd. Stalingrad
 Choisy-le Roi (Seine) Nice (A-M)
 Francujo.

**UNUA INTERNACIA
 INFANKONGRESETO**

en la kadro de la

41-a Universala Kongreso de Esperanto
 (Kopenhago 4—11 Aŭg. 1956).

Specialaj aranĝoj por Esperanto-parolantaj infanoj
 de 6 ĝis 13 jaroj

- * restado en frateca atmosfero
- * ludoj, kantoj, prezentado, ekskursoj, vizitoj
- * zorgado dum la tuta kongresa semajno en esperantista spirito

Aliĝu tuj! Petu informojn ĉe:

41-a Universala Kongreso de Esperanto Kopenhago,
 Danlando aŭ „Internacia Ludoĉambro”, Hartmanns-
 vej 23, Hellerup, Kopenhago, Danlando

Presita en Nederlando ĉe Zwagers, Rotterdam

